

# *Lingvo Internacia*



*Duonmonata gazeto*

*por*

## *Esperanto*

*eliranta la 1-an kaj 15-an de ĉiu monato*



*XI-a Jaro*



PARIS V<sup>e</sup>  
PRESA ESPERANTISTA SOCIETO  
33, Rue Lacépède, 33

## ONI ABONAS L. L. ĉe:

a) oficejo de la gazeto en **Paris**, — b) S-ro *P. Ahlberg*, Sekretario de Klubo Esperantista, en **Stockholm**, (Svedlando), Döbelnsgatan 50, — c) S-ro *Manuel Benavente*, Sociedad 14, **Murcia**, (Hispanlando), — d) S-ro *K. Ostanievič*, «Kontoro Esperantista», en **S.-Peterburg** (Ruslando) Jaščik 80, — e) Societo «*Esperon*» en **S.-Peterburg** (adr. D-ro *A. I. Asnes*, Bolšaja Podjačeskaja, d. 24. kv. 12.), — f) Firmo *Möller & Borel*, Prinzenstrasse 95, **Berlin S.** (Germanlando), — g) Firmo *J. Lindauer'sche Buchhandlung (Schöpping)*, Kaufingerstrasse 29, **München** (Bavarujo). — Oni sendu abonmonon nur al unu el tiuj ĉi sinjoroj resp. firmoj, aŭ al redakcioj de gazetoj aŭ sekretarioj de grupoj esperantistaj.

Jara abono: sen literatura aldono **5 frankoj**, kiun sumon oni sendu laŭeble per poŝta mandato. (Por papermonoj ni kalkulas: 5 frankoj = 2 rubloj = 4 germ. markoj = 4 ŝilingoj = 1 dolaro = 2,50 hol. floreno = 4 skand. kronoj = 5 aŭstro-hungaraj kronoj.) — Kun literatura aldono **7,50 fr.**

Prezo de ĉiu numero 40 centimoj; numero de la Kongreso 60 centimoj.

**Pago por anoncoj:** 40 centimoj por linio (kompostita el «petit» presliteroj); ĉe pli granda anoncado estas donata rabato laŭ reciproka konsento. Malgrandajn nekomercajn anoncojn ni presas por niaj abonantoj po dudek centimoj por linio. Rabato por almenaŭ ses presoj: 10 %

La ŝanĝo de adreso kostas 50 centimojn.

Poŝtmarkoj estas akceptataj nur por  $\frac{3}{4}$  de ilia valoro.



## ELDONOJ

DE LA

### PRESA ESPERANTISTA SOCIETO

(akcia societo

de diverslandaj Esperantistoj)

PARIS, 5<sup>e</sup>

33, rue Lacépède, 33.

*La dekstraj pli nigraj prezoj entenas la sendelspezojn.*

**Esperanta Sintakso**, laŭ verkoj de D-ro Zamenhof kaj aliaj aŭtoroj. Tute verkita en Esperanto, de P. FRUICIER. Klarigas aparte la uzadon de l'artikolo, verbo, participoj, tempoj kaj modoj, prepozicioj, ktp. Ebligas rapide akiri bonan stilon en Esperanto.

1 fr. 50. — 1 fr. 60.

**Esperanta Versfarado**, de TH. CART kaj PARISOT. Klarigas per ekzemploj tiritaj el la Esperanta literaturo, kiamaniere D-ro Zamenhof kaj la plej lertaj poetoj esperantistaj ritmigus siajn verkojn. Gvidilo por ĝuadi la ĉarmon de la esperantaj versaĵoj. 30 cent. — 35 cent.

**Frazlibro de l'Turisto**, 400 utilaj frazoj en Esperanto por la vojaĝo kaj ĉiutaga vivado kun tradukoj angla, franca, germana, hispana kaj itala; resumo de la esperanta gramatiko en kvin lingvoj; adresaro de grupoj esperantistaj en la tuta mondo, k. a.; nova eldono (3-a), en presado.

*(Daŭrigo sur la sekvanta paĝo)*

## ELDONOJ DE LA

**Presa Esperantista Societo, 33, rue Lacépède, Paris**

(Daŭrigo)

**Kurioza Sunhorloĝo**, de S. POLJANSKIJ. Montras, kiel oni povas facile konstrui praktikan sunhorloĝon en ĉiuj lokoj sur la tero; kvar desegnaĵoj kaj tabeloj klarigas la tekston; 2-a eldono.

20 cent. — 25 cent.

**Trafendita Turo**, originala versaĵo en Esperanto kun franca traduko de TH. CART. Luksa broŝureto, vendata por la propagando inter blinduloj.

25 cent. — 30 cent.

**Ĉu la lingvo internacia povas esti la latina?** Artikoloj tiritaj el *L'Espérantiste*, france kaj esperante verkitaj de L. DE BEAUFONT; enhavas ĉiujn argumentojn kaj rebatojn pri la akcepto de latina lingvo kiel internacia; ebligas facile rebati la tiel ofte faratajn kontraŭdirojn.

60 cent. — 70 cent.

**Perdita kaj Retrovita**, originala legendo en Esperanto verkita de E. BOIRAC, rektoro de la Dijona Universitato.

60 cent. — 65 cent.

**Edziĝo Kontraŭvola**, unuakta komedio de MOLIÈRE, tradukita de V. DUFEUTREL; — ludita en la Kongreso en Boulogne-sur-Mer:

60 cent. — 70 cent.

**Homa Doloro**, poemo originale verkita de FEZ.

30 cent. — 35 cent.

**Paŭlo kaj Virginio**, de BERNARDIN-DE-SAINT-PIERRE, tradukita de H. HODLER.

1 fr. 25. — 1 fr. 45.

**Ruĝa Floro**, rakonto de V. GARŠIN, tradukita de K. BOGUŠEVIČ.

30 cent. — 35 cent.

**Sep Rakontoj**, originale verkitaj en Esperanto, de IVAN MALFELIČULO.

1 fr. — 1 fr. 15.

**Rolandkanto** (*Chanson de Roland*), tradukita en Esperantaj versoj, de D-ro NOEL.

1 fr. 50. — 1 fr. 70.

**Grasa lignajlsto**, tradukita el itala lingvo, de G. CHAVET.

50 cent. — 55 cent.

**Elementa fotografa Optiko**, de KARLO VERKS. Tiu verko montras kaj difinas la diversajn esprimojn teknikajn, kiuj estas kutime uzataj en fotografa optiko; — 1 broŝuro 12 × 19 cm. da 80 paĝoj kun klarigaj ilustraĵoj.

1 fr. 25. — 1 fr. 40.

**Oficiala protokolaro** de la Unua Kongreso Universala de Esperanto en Boulogne-sur-Mer

30 cent. — 35 cent.

**Esperanta Radikaro**, de TH. CART, por blinduloj kaj neblinduloj. Entenas sen la traduko la radikojn, kiuj troviĝas en niaj diversaj vortaroj. Tre oportuna libreto por lerni radikojn.

60 cent. — 65 cent.

**Instruado de Esperanto per bildaro**, broŝureto kun ilustraĵoj, por ekzercoj de interparolado.

25 cent. — 30 cent.

**La Benkoj de la promenejo**, de J. JOUY, tradukita de P. CORRET, Amuza tedmonologo.

20 cent. — 25 cent.

**Mallumaĵoj**, rakonto, de ABONYI ÁRPÁD, — tradukita el la hungara lingvo de LENGYEL PÁL.

60 cent. — 70 cent.

**Les Mots Esperanto groupés selon le sens**, par MARCEL BOBIN. 1 vol. 11 × 17 cm. de 130 pages.

1 fr. 25 — 1 fr. 35

**Notions élémentaires d'Espéranto et Exercices de Conversation**, par TH. CART. — Vendu au profit de la propagande parmi les aveugles. — Deux fascicules.

25 cent. — 35 cent.

**AVIZO GRAVA.** — Ni petas niajn klientojn, ke ili volu aldoni por la abonoj al gazetoj aliaj ol « Lingvo Internacia » kaj « Juna Esperantisto », po 10 centimoj.

La poŝtmandatoj devas esti adresataj **ne** persone, sed al la **Presa Esperantista Societo, 33, Rue Lacépède, Parizo.**

Se nomo de poŝtoŝicejo por la pagejo estas bezonata, oni donu « **Bureau de poste N° 29, Rue Monge, Paris** ». Ni al-tiras speciale sur tiun gravan punkton la atenton de niaj klientoj anglaj kaj amerikaj; sen tiu sciigo, ni havas multajn mal-facilaĵojn por enspezi tiujn mandatojn.

**La Grupo Esperantista Neuchâtel'a** eldonis novan *Signou Esperantan*, kiu, ne tro granda kaj tre simpla, sendube multe plaĉos al la Esperantistoj. Tiu belega signo konsistas el steleto reliefa kaj verde emajlita. Oni povas havi ĝin ĉu butontrua, ĉu kravatpingla. La kosto estas 1 franko po unu. Po almenaŭ 12, ni faras rabaton da 20 o/o kaj sendas a frankite.

Ni aldonas ke la eblan profiton de l'vendo de tiuj signoj oni entute dediĉos al la propagando Esperanta; la Svisa Esperanta Societo ricevos duonon, kaj la Grupo Neuchâtel'a la alian.

Por ĉio koncernanta tiun signon, bonvolu vin turni al la sekretario de la grupo: S-ro H. STROELE, Orangerie 4, Neuchâtel (Svisujo).

Ni volonte sendos por ekzameno modelojn de nia signo al la grupoj kiuj ĝin deziras.

---

S-ro G. STEWART, 34, Arundel Avenue, Sefton Park, Liverpool, England, deziras korespondadi kun alilandaj gesperantistoj.

---

## « Esperanto » propaganda gazeto en lingvo franca.

Unu numero 10 centimoj, 24 numeroj sinsekvaj 3 fr. Sin turni al la *Presa Esperantista Societo*, aŭ al l'administranto de *Esperanto*: Sinjoro PAUL BERTHELOT, Céret, P.-O. Franclando.

---

HELSINGFORS, Finlando, *Martin & Mäkelä*, librejo (adr.: It. Wiertotie 6, Felef, 5434, rekomendas sin al la finlandaj Esperantistoj.

---

A. S. FEDORĈENKO, studento, *Ruslando*, (Crimée), Jalta, San « Sastria », deziras interŝanĝi salutojn kun esperantistinoj ĉiulandaj per ilustritaj estetikaj poŝtkartoj kun vidaĵoj de urboj, kaj portretoj de societaj eminentuloj kaj geartistoj francaj. — Responde li sendos artan poŝtkarton.

---

Oni deziras aĉeti jenajn numerojn de gazetoj:

*Lingvo Internacia*: 85 (Jan. 1903). — 95 (Nov. 1903). — 97 (Jan. 1904).

*La Lumo*: 1903. — n-rojn 4 — 7 — 8 — 9 — 10. etc. ĝis laste eldonita.

Sin turni al **Librejo L. Lamlot**, Céret, P.-O., France.

---

GUSTAV SCHWENGELER, *Hegi (Zürich), Schweiz*. — Rekomendas sin kiel citra instruisto. Instruado laŭ normala kaj viena metodo. Studado de kantoj kaj aranĝoj de koncertoj. Programo da 700 numeroj. Gaja kaj serioza muziko. Atestoj al servoj.

---

**A. V. Aleksandrov**, *Jalta, Ruslando*, deziras korespondadi per leteroj aŭ ilustr. poŝtk., kun neeŭropaj gesperantistoj.

# Lingvo Internacia

Duonmonata organo en Esperanto

Redakcio kaj administracio : PARIS, 5-e Arr., 33, rue Lacépède, 33

15 aprilo 1906

<b>Jules Bois</b> : La serpento (trad. MARCEL FINOT)	225
<b>S-rino Edgren</b> : Sesamo, malfermigu (trad. SAM. MEYER)	230
<b>Miksajoj</b> : « Bohema kruco » apud Crécy. — Paskaj ovoj en Moravio. — Schlisselburg'a fortikaĵo. — Bagateloj	232
<b>D-ro Lloyd</b> : Antaŭhistoria gramatikisto	235
<b>Paul Champion</b> : Terkultura kalendaro	237
<b>R. Codorniu</b> : Hispanaj proverboj	242

## Tra la mondo Esperantista

<b>J. Parisot</b> : Esperanta versfarado	243
<i>Nekrologio</i> : S. Silbernik	246
Movado Esperantista	247
Gazetaro Esperantista	253
Dua Universala Kongreso en Genevo	255
Akcioj de la <i>Presa Esperantista Societo</i> .	256

**Nia aldono literatura** (paĝoj 113—128) : **Rememoro pri Solferino**, de H. DUNANT (tradukis VAILLANT kaj FRUICIER), *daŭrigo*.

## LA SERPENTO

El *Visions de l'Inde* de JULES BOIS.

### I

Ni jam estis kuŝigintaj kaj mi estis mian lampeton estinginta, kiam mia servisto, kiu estis kutime, sub la vitroĉambro, alkuris timigite :

« — Sinjoro, kobraserpento ĵus eniris en la domon. Mi vidis ĝin kiam ĝi transiris la pordon de via ĉambro ».

Mi leviĝas rapide. Kobro! nokta serpento, kies vundoj estas mortigaj, la besto-dio adorata, per kiu Shiva ĉirkaŭas sian kolon kiel per vivanta silktuko, kaj kiu ĉiujare mortigas milojn da loĝantoj nudpiede irantaj tra la kamparo.

Rapide ni rebruligas la lampon kaj ni serĉas.

Kiom ofte, en la ĝardenoj, ĉirkaŭ tiu malfermita domo, mi kredis aŭdi la malamikon glitantan. Sed, ĝis hodiaŭ, mi ekvidis ĝin nur pajloŝtopitan en muzeoj, aŭ molan kaj sendantan en manoj de fakiroj. Ĝia ideo, ĝia figuro min senĉese vizitadis, en tiu lando kiu tute estas ĝia, kiun ĝi kreis saman kiel ĝi. Tra Hindujo oni vidas ĉie la serpenton :

en la ondolinia fleksebleco de la virina korpo, en la brilaj kaj malsekaj okuloj de la almozuloj sanktaj, en animo mem de la loĝanto, hipokrita, tima, kaj subite freneza kaj fajfanta, kun malama pikilo...

Mi akceptis konsilon, neniam nudpiede marŝi tra mia ĉambro, kaj ĉiam, antaŭ ol mi ekdormos, mi rigardis sub miajn littukojn, ĉe kiuj la kobra plezurege plivarmiĝas.

Nune, ni tuj nin renkontos. Kaj frostreme mi pensas ke, ĉi tiun nokton, ĝi estas tie ĉi, la rampanta dio, decidinta — malgraŭ mia volo ja vere — ke ĝi min vizitos. Li povas min fulmofrapri per pikvundo, pro mallerta gesto kiu ĝin atingus... Ĉiuj kuraciloj estas proksimume senefikaj, escepte la serumo de doktoro Calmette, tre uzata en Hindujo... Kaj mi havas nenian kuracilon ĉe mia loĝejo.

Mia servisto, per bastono, levigas antaŭzorge la tapiŝojn, rigardadas la vestojn, esploras la ŝrankojn.

— Sinjoro, la kobra ne atakos vin. Sed se vi ektuŝetos ĝin, vi estos mortigata. Ĝi leviĝos, ŝveligos sian kolon kaj pikvundos. Tio estas subita kaj nekuracebla.

Ni vane serĉas. La dometo estas cetere preskaŭ malplena, facile observebla. Nenio. Mi fine trankviliĝas. Mi scias, ke mia servisto, kvankam mahometano, volonte drinkas por ĉirkaŭe dudek centimoj parfumitan likvoron, kiu konsistas el miksaĵo da sukero, floroj kaj opio... Sendube senteraro lin trompis. Mi rekuŝiĝas kaj resendas lin en la vintroĉambbron.

## II

....Sed tra la mallumo — ĉu ja mia imago laboradas? — ŝajnas, ke io vivanta, mola, moviĝas per paŝo de fantomo, glito de ŝtelisto. Mi aŭskultas, mi timas — jes, mi konfesas, ke mi terurege timas — ĉar nune murmuro estas aldonita al la bruoj; ĝi estas bloveto apenaŭ aŭdebla, dolĉa fajfo, daŭra, lingvaĵo de nevidebla, malglora besto. Mi rebruligas, ĉio silentas, mi nenion vidas....

Mi denove estingas : la brueto rekomenciĝas. Mia timo iĝas netolerebla. Mi memoras, ke ofte la kobro volviĝas ĉe la traboj de la plafono, falas preskaŭ senbrue sur la kulovualon kaj ŝoviĝas al la varmo de la liĵo. Leviĝi, dormi kiel mia servisto en la vitroĉambro, mi pri tio pensas, sed mi timas la febron kaj la kulojn kaj aliajn bestojn. Mi nur ne estingos mian lampon, kies lumo min protektos, kaj mi ĝis la mateno ne dormos.

Cetere la printempo estas varmega ; iom post iom la bestaro de Hindujo, vekiginta el sia vintra dormado, enpenetras en la homajn domojn. La gento de la kuloj okupas per densaj nuboj la trionon de la loĝejo. Tiu ĉi laŭteta orkestro neniam silentas kaj zumadas tiel unutone, ke, aliajn noktojn, ĝi ne malhelpis, ke mi dormu. Ranoj kantas en mia lavoĉambro, lacertoj promenas tra la plafono ; mi memoras eĉ ke, antaŭ du tagoj, skorpio estis en mia pantoflo....

Sed mi tie ne ankoraŭ spiris la atmosferon de serpento. La fenestroj de la tegmento paliĝas. La tagiĝo venas ; mi ekspiras pli libere : al mi ŝajnas, ke la danĝero estas for !

Mi kuras al la lavoĉambro ; mi lavas min ĝoje post tiu sendorma nokto da febraj ŝvitoj. Apenaŭ mi estas seka, kiam mia servisto alvenas.

Lia mieno estas pli enigma ol ordinare, ŝajnas eĉ ke li hipokritas. Mi sentas, ke li tuj agos kontraŭ mi, kiel kontraŭ *blanka homo*, kontraŭ malamiko, kiun oni timas kaj kiun oni trompas. La profundegaĵo, kiu apartigas la rasojn, iĝas pli kaj pli profunda. Kion ja li volas?

— Sinjoro, ĉu vi volas mortigi la serpenton?

— Unue mi volus ĝin trovi. Tio estas tiel malfacila kiel necesega.

— Vi volas do ĝin mortigi?

— Kial do ne?

La servisto silentas. Mi observas lin : li iĝas pli kaj pli hipokrita kaj kaŝema : liaj palpebroj estas kovritaj. Mi sentas, ke mi nenion per li faros, se mi ne faros tion, kion li pensas.

— Ĉu vi ne mortigus la serpenton, junulo ?

— Sinjoro, estas malbone mortigi la bestojn.

— Sed vi ne havas la superstiĉojn de la Hinduoj vi estas ja mahometano....

— Tio estas egala, Sinjoro, la serpento estas sankta.

— Sed se vi ne mortigos ĝin, ĝi mortigos vin.

La junulo faras geston indiferentan :

— La morttago de ĉiu estas enskribita en la libro de Allah.

Mi pripensas. Vere, kial mi mortigus la serpenton ? Nur sendorman nokton ĝi kaŭzis al mi. Mi timis, sed tio instruis min pri la respekto al bestoj, eĉ malutilaj ; ĉiu devas ludi rolon en la Universo ; plie, la Naturo, nia patrino, konsistas ne nur en amindaĵoj, belegajoj ; mistero da kruelaĵoj estas ankaŭ en ĝi kaŝita. Tigro kaj serpento estas pri tio vivantaj simboloj. Kial ilin malami ?

— Mi ne mortigos la serpenton, ĉar tio enuas vin... Sed, kondiĉe ke oni je ĝi baldaŭ min liberigos.

La malluma haŭto de mia servisto ŝajnas vere heliĝi. Mi kontentigos per li la genion de la raso. Li iĝas parolema kaj konfidema.

— Mi alvokos tuj la « snakeman », Sinjoro (serpentĉarmiston). Por 25 rupioj, li prenos la serpenton, kiel floron, kaj, sen vundo, transportos ĝin malproksimen en la kamparon. Se vi ne estus promesinta ĝin pardoni, vi estus devigata pli kare pagi, ĉar la snakeman estas Hindo, li respektegas serpenton, kiel korpigon de Dio Shiva mem, kaj, ĝin mortigante, li estus grandege pekinta.

Mi ja komprenis : la devo de servisto estas elŝiri el la Sinjoro kiel eble plej monon ; dum la nokto, la junulo, post liaj preĝoj al la Profeto, pripensis, kiel li mem ŝtelos ; kaj la aventuro de la serpento estas neantaŭvidebla okazaĵo, ĉar mi facile divenas ke li ja dividos la gajnon kun la snakeman. Eble li mem alkondukis la kobron en mian ĉambro por eksciti mian malavarecon.

### III

— Sinjoro, mi ĵus alkondukis la « snakeman ». Li estas tie, ĉe la vitroĉambro, kun fluto kaj korbo.

Certe la sceno estas antaŭe preparita. Mi akceptas agi tiel kiel volas la junulo, kaj cetere mi estos kontenta, sciigante kiel tiu artisto povos eltrovi la hindan serpenton.

Li estas tute nuda beleta, malgraŭ lia maldikeco, kun malgranda tuko kunligita ĉirkaŭ lumbo, kaj li mem estas strange simila al la serpentoj, kies ĉarmisto li estas.

Li neniel parolas angle, kaj, por elparoli, li fajfas intersiaj dentoj mallongaj. La okulo estas iom flava, la kranio plata, preskaŭ raza ; nur unu harmeĉo kuŝas malantaŭ la dorso, kie ĝi saltas kiel nigra vipero. Ĉirkaŭtalo kun grandegaj butonoj kunvolviĝas ĉirkaŭ lia talio fleksebla kaj movema. Per siaj kruroj li faras tion, kion li volas ; ili estas kolubroj kiuj turniĝas, kunvolviĝas kaj malvolviĝas laŭvole.

Li salutas min tre respekteme, levante manon al sia frunto, kie estas tatuita la tridento de Shivo, kaj kiam li releviĝas, li havas la movon mem de kobro kiu leviĝas por piki.

El sia korbo li eligas fluton, kaj promenadas tra mia ĉambro per paŝoj malrapidaj, ludante bizaran arion kiu estas simila al nenio konata kaj kiun oni povus imagi elfarita per unutona plendo de virino kaj per malsimplaj bruetoj de arbaro.

— Vi foriru, Sinjoro, diras la servisto, la serpento tuj venos, ĉarmita de la fluto.

Sed la kobro sendube timas, ĉar nenio ankoraŭ aperas.



Se mi ne volus konservi antaŭ tiuj nigruloj mian allogon de Eŭropulo, mi volonte irus promenadi en la ĝardenon. Tamen la memestimo kaj scivolo venkas. Mi restas.

La snakeman obstine ludas sian bizaran arion, kiu fine kaŭzas al mi malsaneton. Nune li aliras mian lavoĉambbron ; per kataj paŝoj, korpo iom kliniĝinta, okuloj avidaj, li serĉas la beston.

Mi rigardadas lin, kaj — tio multege miras min — unu el la piedoj de tablo, kie mi metas miajn spongojn, ekvivas. Malgranda kapo, flava, leviĝas kun duobla fadeno kiu tremas inter dentoj similaj al dikaj kapoj de pingloj.

Tio estas la kobra, tio estas ĝi. Mi rigardas ĝin kiel multekostaĵon, danĝeraĵon, kiun sendube ne plu liberan mi vidos.

Timigita de mia lampo, ĝi estis tien rifuĝinta, kaj, apud ĝi mi estis tute min lavinta ; mi estis sur tiu tablo apoginta, mi estis tie kruĉojn metinta. Nuda, mi, ne ĝin vidante, estis apud la malamiko. Ankoraŭ mi dankas la Feliĉon, kiu min savis je tiu danĝero, en kiu mi staris, nekonscia kiel infano. —

Nun, cetero, mi forgesas danĝeron por admiri la vidaĵon. Kobro, per ritmo de la ĉarmisto, malvolviĝas kvazaŭ rubando tirita de nevidebla mano. La malhelaj okuloj de la snakeman iĝas lumaj, kaj li hipnotizas la beston, kaj per sia kolo imitas la balancojn, reeniras, altiras ĝin al si per forto de rigardo, per influo de sia barbara muziko.

La kobro forlasis la piedon de l'meblo. Ĝi estas malgranda, flava, ĝi estas luksa besto, nobela kaj kruela, kun reĝa irado. Ĝi staras, duono de ĝia korpo estas sur cetero de ĝia kunvolvita korpo, ĝi antaŭeniras malrapide, fiere ; la haŭto de ruĝflava kolo malfermiĝas kiel kroneto de orkeido ; taskoj similaj al rozkoloraj larmoj plenigas teruran belecon de la besteto.

Jen li estas apud la ĉarmisto, kies mano malrapide kaj certe falas sur lian platan kapon. Kvar fingroj premas la ŝvelintan kolon, kaj nenian mordon timas ; la maldika fingro premas la cerbon, naskantaj subitan katalepsion. La serpento estas venkita, senmova ; la fluto silentas, korbo estas malfermita ; per rapida movo la Hindo ĵetas en sian kaptilon la hipnotitan kobron.

Ja vere, mi ne bedaŭras la ekscitiĝojn de tiu nokto. Ili kaŭzis al mi tiun scenon de ĉarmo... Mia servisto kaj la Hindo foriras, kaj mi aŭdas ke ili mallaŭte interkonsentiĝas, ili dividas inter si mian monon, lian akiraĵon.

*Esperantigis* MARCEL FINOT.

# Sesamo, malfermiĝu!

Novelo, de S-ino EDGREN.

Unu fojon estis — diras la fabelo.

Tiun ĉi fojon ĝi estis oficisto, ne tre juna, kun ŝajno iom mizera, kiu de sia oficejo revenis hejmen en la tago post sia edziĝo.

La edziĝtagon mem li ankaŭ estis pasinta sidante en la oficejo kaj skribante ĝis la tria. Poste li eliris kaj kiel ordinare havis sian modestan tagmanĝon en malhela restoracio de unu el la stratetoj de la urbo ; post tio li supreniris al sia ĉambreto sub la tegmentoj en malnova domo de la granda strato Orienta por preni sur sin la frakon, iom akarmordetitan, kiun li estis uzanta de dek du jaroj.

Li longe estis pripensinta, ĉu li aĉetos novan frakon por sia edziĝo, sed li fine decidis, ke tio ĉi estus ja senutila lukso.

La fianĉino estis telegrafistino, iom paligita kaj malfortigita de la laborado kaj fastado, kaj neniel prezentis brilantan eksterajon. La ceremonio okazis tute trankvile ĉe maljuna fraŭla onklino de la fianĉino, kiu loĝis en la Suda kvartalo. La fianĉino havis nigran robon el silko, kaj la novaj geedzoj iris al sia loĝejo per luveturilo.

Tiel estis pasigita la tago edziĝa ; sed nun estis la sek-vanta tago. De la deka horo li estis sidinta en la oficejo tute same, kiel en la aliaj tagoj. Nun li estis sur la vojo hejmen — hejmen !

Tio estis sento stranga, sento ja tiel potenca, ke multfoje sur la vojo li ekhaltis en profunda pensado.

Sceno de liaj infanaj jaroj ekvenis en lian memoron.

Li revidis sin knabeto, sidanta apud la skribtablo de sia patro en la malgranda vikarejo kaj leganta fabelojn. Kiom da fojoj li legis kaj relegis sian preferatan fabelon el « Mil unu noktoj » *Ali-Babo aŭ La kvardek rabistoj* ! Kiel forte batis lia koro, pro maltrankvila atendado, kiam, kun la heroo de la fabelo, li staris antaŭ la fermita pordo de la kaverno kaj ekkriis, en la komenco mallaŭte kaj iom time, poste laŭte kaj brave : « Sesamo, Sesamo, malfermiĝu ! »

Kaj kiam la monto malfermis siajn pordojn, kia belegajo ! La mizera ĉambro de la vikarejo subite fariĝis la riĉa trezorejo de la monto, kie sur la muroj ĉirkaŭaj briladis la plej belaj juveloj ; tie troviĝis ankaŭ ĉevaloj, kaleŝoj, bele provizitaj ŝipoj, bataliloj, armiloj — ĉiuj belegajoj, kiujn knabeta fantazio povas imagi.

La maljuna patro rigardis kun ekmiro sian plej junan filon antaŭ tiel longe li mem estis infano, kaj liaj aliaj gefiloj jam estis tiel grandaj, ke li ne komprenis plu la infanon kaj

iafoje demandis lin, preskaŭ riproĉe, pri kio li pensas, ĉar liaj okuloj tiel forte brilas.

Poste la oficisto komencis pensi pri sia vivo kiel junulo, kiam li lernadis en Upsalo. Li estis poeto, rakontema : li estis rigardata kiel talentulo kaj liaj kolegoj lin alte ŝatis. Kiu tiam estus antaŭdirinta, ke li fine fariĝos simpla kopiisto, edziĝos kun paliĝinta telegrafistino kaj loĝos sur la strato de ŝnuristoj en la suda kvartalo ! Ho ! La vivo prezentis mil eblaĵojn ; la perspektivo de la estonteco estis senlima ; nenio estis neebla. Neniu honoro estis tiel granda, ke li ne povus atingi ĝin ; neniu virino tiel bela, ke li ne povus gajni ŝin. Kion malhelpis, ke li estas malriĉa, ke li estas nomata simple Andersson kaj ke li estas oka filo de malriĉa vikario, kiu mem estis filo de vilaĝano ? Ĉu ne eliris jam multaj geniuloj el la mezo de la popolo ? Jes, lia genio devis esti por li la sorĉa formulo, lia « Sesamo, malfermiĝu ! » ebligonta al li la akiron de ĉiuj belegajoj de la vivo.

Pri tio, kio poste estis okazinta, li nun ne penis pensi. Ĉu lia genio eble ne estis tiel granda, kiel li estis pensinta, ĉu ĝin sufokis la monaj embarasoj, ĉu la malfeliĉo sola estis kulpa je ĉio, kia ajn estis la kaŭzo, al li okazis same, kiel al la malbona frato de Ali-Babo, kiu, jam enirinte en la kavernon, kun teruro ekrimarkis, ke li forgesis la sorĉan formulon, kaj kun mortiga maltrankvilo serĉadis ĝin en sia memoro.

Malfacilajn tagojn li estis pasiginta — sed al kio utilis nun pensi pri tio ?

Tiaj pensoj rapide sekvis unu la alian en lia cerbo. Subite li komencis pensi pri ŝia reĝedzina moŝto, kiu antaŭ kelkaj tagoj faris solenan eniron en la ĉefurbon. Li estis ricevinta la permeson akompani siajn estrojn kaj stari en la festa pavilono dum ŝia surbordiĝo. Bela momento tio estis ! La poeta kapableco de lia juneco preskaŭ revekiĝis pro la soleneco de tiu horo, kaj se li ankoraŭ estus la iama juna poeto plena je promesoj, anstataŭ ol la hodiaŭ nekonata oficisto, li sendube estus skribinta festan poemon kaj sendinta ĝin al la gazeto « La Poŝto ».

Belega devis ja esti tiu tago por princino Viktoria. Ĝi estis tia momento, kian ne ofte prezentas la vivo. Esti 19-jara, ĵus edziniĝinta kun juna edzo, ami kaj esti amata, kaj fari solenan eniron en sian fariĝantan ĉefurbon feste ornamitan kaj kuŝantan tie fabele belan sub la aŭtuna suno, esti salutata per ĝojkriado de nekalkulebla popolamaso kaj esti tiel malsperta pri la vivo, ke oni ne suspektas iun el la ombroj, kiuj sin kaŝas post la brilanta vidaĵo — jes, certe ĝi devis esti neforgesebla momento, momento kiu troviĝas en tiel malmultaj vivoj homaj, ke ĝi plibone ŝajnas aparteni al la tabela mondo, ol al la reala. Kiam do la sorĉa formulo « Sesamo, malfermiĝu ! » naskis ion pli belan ?

Tamen ! Tamen ! La oficisto estis alveninta hejmen kaj stari antaŭ sia propra vestibla pordo. Ne, la reĝido, kiam li enkondukis sian edzinon en sian ĝojantan ĉefurbon, certe ne estis pli feliĉa ol li mem estis en tiu ĉi momento. Li estis retrovinta la

sorĉan formulon, longe perditan. Tiu ĉi butoneto de sonorilo estis lia « Sesamo, malfermiĝu ! ». Li nur bezonis premi ĝin, kaj la monto tuj prezentos siajn trezorojn — ne batalilojn kaj armilojn, kiel en lia infaneco — ne honoron, respekton kaj situacion, kiel en lia juneco — ne, ion, kio estas la kerno mem de ĉiu feliĉo homa, tiel sur la altaĵoj de la vivo, kiel en la anguletoj plej kaŝitaj, — koron, kiu batis nur por li, propran hejmon, kie iu malpacience atendis lin, edzino ! Jes, edzino, kiun li amis, ne kun la unua juneca pasio, sed kun la fervoro kaj fideleco de la aĝo matura.

Li staris antaŭ sia propra pordo, li estis laca kaj malsata, kaj lia edzino lin atendis por tagmanĝi. — Tio estis ja tre ĉiutaga kaj triviala — kaj tamen tiel mirige nova kaj alloga.

Malrapide, singardeme, kiel infano ricevinta novan ludilon, li premis la butoneton — kaj tie li staris senmove, haltiginte la spiradon kaj aŭskultante la facilajn, rapidajn paŝojn, kiuj alproksimiĝis.

Ĝi estis tute same, kiel en lia infaneco, kiam li staris antaŭ la monto kaj ekkriis, komence mallaŭte kaj iom ĝenate, poste laŭte kaj per voĉo tremanta pro ĝoja atendo

« Sesamo, Sesamo, malfermiĝu ! »

*Trad. SAM. MEYER.*

## MIKSAĴOJ

### « Bohema kruco » apud Crécy (Francujo).

Apud malgranda urbo Crécy en Pikardio staras de malnova tempo simpla, granita kruco, konata sub nomo « Croix de Bohême », kiu estis starigata en jaro 1360 ĉirkaŭe, por honorigi boheman reĝon Johanon kaj lian sekvantaron falintan en batalo. La kruco rememorigas la batalon inter franca reĝo Philippe VI kaj angla Edward III la 26-an de aŭgusto 1346. En tiu ĉi batalo helpis al Philippe aventurema reĝo bohema, « Johano » kun elektita grupo de bohemaj kavaliroj, el kiuj preskaŭ ĉiuj trovis sur batalkampo heroan morton. Por memoro al tiuj, kiuj oferis sian vivon por fremda nacio, oni starigis ŝtonan krucon, kiu bedaŭrinde dum jarcentoj estis difektata. Lasttempe ĝi estas plibonigita kaj krom tio estas konstruita sur la placo en Crécy eleganta monumento kun surskribo : « Al Jan Lucembursky, reĝo bohema kaj al kolegoj mortintaj la 26-an de aŭg. 1346 por Francujo. » La monumento estas solene malkovrita dum ĉeesto de delegitoj francaj, luksemburgaj kaj bohemaj. ( H. K. B. )

**Paskaj ovoj en Moravio.** — Pri artista talento de miaj samlandanoj, precipe Slovakoj, atestas ankaŭ paskaj ovoj (kraslice), kiel mi jam skribis. Tiujn ovojn pentras junaj eĉ maljunaj virinoj en slovakaj vilaĝoj antaŭ Paŝko. Kaj kiam venas la paska lundo, ĉiu junulino sendas ilin al sia amanto. Riĉaj junulinoj sendas multe da ili kaj ankoraŭ aliajn donacojn sukeraĵajn. Rekompence ili ricevas de siaj amantoj silkajn tukojn.

Vi volas eble scii, kiamaniere paskaj ovoj estas preparitaj. Volu do, mi petas, sekvi afable ĉi tiujn liniojn.

Pentristino preparas al si kolorojn en vazetoj, vakson, brulantan karbon, por ke la vakso estu konstante fluanta, ovojn kaj strangan pentrilon. Jen estas ĉi tiu pentrilo simpla ligneto estas supre iom disfendita, kaj en la disfendon estas enmetita mallarĝa lada tubeto. La ligneto estas ĉirkaŭvolvita per fadeno, por ke la tubeto ne elfalu. Pentristino tenas ovon en unu mano, per la dua mano trempas la tubeton en fluantan vakson, kaj desegnas per ĝi sen kia ajn modelo diversajn desegnaĵojn, kiuj restaj blankaj. Poste, ŝi desegnas simile diversajn desegnaĵojn, ekz. per la ruĝa koloro, kaj pretajn ruĝajn modelojn ŝi kovras ree per vaksó. Simile ŝi desegnas per aliaj koloroj diversajn modelojn, kaj ĉiam ŝi kovras pretajn modelojn per fluanta vakso. Fine tuta ovo estas preskaŭ kovrita per vakso. Tiam la pentristino enmetas l'ovon en ian ankoraŭ neuzitan koloron. Poste, ŝi lasas ĝin seki. Sekan ovon ŝi iom varmigas kaj per ia tuko ŝi facile forigas vakson. Kaj nun aperos diverskoloraj desegnaĵoj.

En multaj vilaĝoj oni preparas ankoraŭ alimaniere paskajn ovojn. Pentristino kovras tutan ovon ekz. per la ruĝa koloro. Poste ŝi elgratas el tiu koloro per tranĉilo diversajn modelojn.

*(El privata letero de S-ro ED. KOUBEK, instruisto en Podivin, Moravio).*

**Schlisselburg'a fortikaĵo.** — La fama Ŝlisselburg'a fortikaĵo estas unu el multenombraj malliberejoj por politikaj « krimuloj ». Ĝi estas konstruita sur insuleto en tiu loko kie rivero Neva elfluas el Ladoga lago kaj estis aliformigita en politikan malliberejon je 13-25 aŭgusto 1884. Por tiu ĉi fortikaĵo estis kreita speciala ĝendarma gardantaro. Ciu membro de tiu ĉi gardantaro ricevadis duoblan ŝtatan salajron. Elspezoj por Ŝlisselburga fortikaĵo kostas 75000 rublojn ĉiujare. Regimo en tiu turmentejo ne estas priskribebla. Enŝlositoj estis tute izoligitaj, oni ne permesadis interfrapadi, ne kanti, nek fajfi, nek iri rapide, entute kian ajn elmontron de vivo, de flanko de enŝlositoj oni severege persekutadis. Je unuaj jaroj ferajn litojn oni dum tago forportadis, tiel ke eĉ malsanuloj kuŝadis sur nuda planko. Libro ne estis en fortikaĵo. Malsanuloj kuŝadis kaj mortadis en samaj ĉeloj ; eĉ al mortantoj oni ne allasadis amikojn ; pri morto de iu el malliberu-

loj ceteraj enŝlositaj eksciadis per tio, ke en ĉelon de mortinto eniradis kelkaj ĝendarmoj, kion oni povis ekscii laŭ bato de pordoj, tinto de spronoj kaj pezaj paŝoj de homoj forportintaj malvivulon. Tie ĉi en ĉelo oni tenadis ankaŭ tiujn, kiuj, ne elportinte malnoblan premon, frenezigadis. Ilia freneza ridego kaj krioj alkondukadis ceterajn al frenezigo.

En daŭro de jaro 1884 ĝis nuna tempo en Slisselburgaj ĉeloj estis kaŝitaj 67 homoj.

El ili 13 estis ekzekutitaj, tri memmortiĝis, (unu sin bruligis de petrolo el lampeto, mortis en teruraj turmentoj ; dua per vitro de lampo malfermis al si arterion). Lastaj du memmortigoj kaŭzis kelkan moligon de barbara reĝimo ; je rimedoj de enŝlositoj estis aranĝita malgranda biblioteko, estis donita ebleco labori en metiejoj kaj legoma ĝardeneto, estis permesitaj promenadoj duope, sed kolegon de promenado oni devis ŝanĝi post ĉiu duonjaro. 16 homoj el enŝlositoj mortis de frenezigo, skorbuto kaj tuberklozo. Tri el liberigitaj memmortiĝis baldaŭ post ricevita libereco.

Por rakonti ĉiujn teruregojn de tiu turmentejo ne sufiĉas homaj fortoj.

Tiel korpo de unu el ekzekutitoj estis ĵetita en kavon plenigitan de kalko kaj super la kavo estis starigita fasko de lignoj ; sur tomboj de du ekzekutitoj pasintan someron, estas konstruitaj samaj « monumentoj ». En unu el multenombraj ĉeloj estis enmurigita « nekonatulo », kaj lia sorto ĝis nun estas kovrita per mallumo de sekreto. Leteroj de kaj al enŝlositoj estis transdonataj unu fojon dum 6 monatoj, sed eĉ en tiu ĉi okazo ankoraŭ estadis haltigoj pro malgrandegaj kaŭzoj.

Malgraŭ reĝa manifesto de 17-30 oktobro kaj ordono pri amnestio, la registaro de grafo Witte kaj K-io ne ankoraŭ ŝanĝis leĝon per kiu estis fondita Slisselburga politika malliberejo kaj tie ĝis nun oni ankoraŭ turmentas kvin homojn.

Homaro kaj rusa popolo aparte devas senlace kaj persiste postuladi tutan ruinigon de mallumega turmentejo, kiun Rusujo eniranta sur novan vojon ne bezonas kaj kiu kuŝigas neforlaseblan makulon sur civilizitan XX-an centjaron.

DANIEL MORGAN.

EN RESTORACIO. — Kelnero, donu al mi porcion da fiŝaĵo kun saŭco. Aŭ ne ! mi prenos prefere bovaĵon, ĉar mi ne fidas je viaj fiŝoj ; via mastro aĉetas malfreŝajn fiŝojn mortintajn.

— Ho, sinjoro, ĉu vi pensas, ke ni eble aĉetas bovojn vivantajn ?

RIFUZO. — *La fraŭlo* Ho ! fraŭlino, mi amas, mi adoras vin *neesprimeble* per homa lingvo !...

*La fraŭlino* : Tio faras al mi plezuron ; ĉar mi estas certa, ke vi neniam parolos al mi pri tiu temo.

## ANTAŬHISTORIA GRAMATIKISTO :

verkita de D-ro R. J. LLOYD, D. Lit., M. A.,  
 membro de la Centra Lingva Komitato

Mi faris, meze de Februaro, rimarkindan eltrovon pri la lingvo kaj la gramatiko de niaj Ariaĵ praavoj, kaj oni povas legi mallongan priskribon de ĝi en la marta *Brita Esperantisto*. Sed post tio mi trovis ke estas multe pli por diri pri tiu eltrovo, kaj mi deziras klarigi la tutan aferon al la legantaro de la *Lingvo Internacia*. Mi instruis tiam, samtempe, du lingvajn klasojn, unu Esperantan, en Liverpulo, kaj la alian, Novtestamentan Grekan, en Manĉestro. Instruante la du klasojn pri la tabelo de rilataj vortoj, mi nepre vidis ke la du tabeloj estas ĝuste la samaj. Tio estis tute ne nova. Oni rimarkis tion ofte pli frue. Sed la afero, kiun neniu pli frue estis rimarkinta, estis ke ambaŭ tabeloj devas havi intelligentan aŭtoron, gramatikiston de glora genio, kiuj faris la du tabelojn. Ni konas bone la aŭtoron de la moderna tabelo. Li estas nia kara Majstro. Sed kiu estis la alia? Neniu scias. Neniu pensis ke li ekzistis, ĝis mi faris kaj publikigis mian eltrovon. Mi ŝanceliĝis, dum 3 tagoj, pri la publikiĝo. Ĉar ŝajnis tute nekredeble, ke neniu klerega lingvisto pli frue vidis tion. Sed, ne vidante solan difekton en mia rezonado, mi sendis tiun ĉi teorion la 9-an de Februaro 1906 al la Liverpula *Daily Post*. La rezultato estis plezura surprizo, ĉar ne sola klerulo reĵetis tiun ĉi teorion, kaj la plimulto aplaudiĝis ĝin. Mi skribas nun por *Modern Language Teaching* kaj por *Die Neueren Sprachen* artikolojn.

Ne estis la unua fojo, ke mi estis helpata formi novajn lingvajn eltrovojn per la instruado de nia granda Majstro kaj de lia bonega lingvo. Mi publikigis en *Modern Language Teaching* (1905) artikolon pri « Pensado en fremda Lingvo », kiu pravas per la helpo de Esperantaj kaj aliaj fenomenoj, ke estas multe pli malfacile lerni duan fremdan lingvon ol unuan. La unua devas ĉiam esti Esperanto.

Tiu pruvo estis fiziologia. Mi montris ke la ĉi-patra lingvo lasas liberan spacon en la cerbo por loĝi unu fremdan ling-

von, sed dua fremda lingvo batalas, plī aŭ malpli, kontraŭ la unua.

La du tabeloj, Esperanta kaj Greka, kuras sekve :

Speco de vorto	Sendifina	Universala kaj Disdona	Rilata kaj Demanda	Neanta	Montra
Adjektivo de Eco	ia οἶος	ĉia οἷος	kia ποιος	nenia οὐ τοῖος	tia τοῖος
Tielilo de Motivo	ial τι	ĉial δι' ἑκάστον	kial τί; διά τι; τίπτε;	nenial οὐδαμῶς	tial διὰ τοῦτο
Tielilo de Tempo	iam ποτε	ĉiam ἐκάστοτε	kiam πότε; οτε	neniam οὐποτε	tiam τότε
Tielilo de Loko	ie που	ĉie ὅπου	kie οὔ, ποῦ;	nenie οὔποθι	tie ἐνθα
Tielilo de Maniero	iel πως	ĉiel ἐκάστη	kiel πῶς;	neniel οὐπως	tiel οὕτως
Adjektivo de Posedo	ies τινος	ĉies ἐκάστου	kies τινός;	nenies οὔτινος	ties τούτου
Pronomo montra kaj kolektiva	io τι	ĉio ἕκαστον	kiu τι;	nenio οὐδέν	tio τοῦτο
Adverbo kaj adjektivo de kvanto	iom ὅσον	ĉiom ἕκαστον	kiom ὅσος	neniom οὐδέν	tiom τόσος
Pronomo individua	iu τις	ĉiu ἕκαστος	kiu τίς	neniu οὔτις	tiu οὗτος
Adjektivo de Aĝo	de iu aĝo πηλίκος	de ĉiu aĝo ἐκάστης ἡλικίης	ke kiu aĝo πηλίκος;	de neniu aĝo οὐδεμίας ἡλικίας	de tiu aĝo τηλίκος



Speco de vorto	Sendifina	Universala kaj Disdona	Rilata kaj Demanda	Neanta	Montra
Adverbo de Almovo	ien ποι	ĉien ἐκάστοδε	kien ποι ;	nenien οὔποι	tien ἐνθάδε
Adverbo de Formovo	el ie ποθεν	el ĉie ἐκάστοθεν πάντοθεν	el kie πόθεν ;	el nenie οὐδαμόθεν	el tie ἐνθεν
Adjektivo de Dueco	iu el du ποτερος	ĉiu el du ἐκάτερος	kiu el du πότερος	neniu el du οὐδέτερος	tiu el du ἕτερος
Adjektivo de Proksimeco	iu ĉi τις ἐνθα	ĉiu ĉi ἐκαστος ὅδε	kiu ĉi τίς ἐνθα	neniu ĉi οὐδεὶς ἐνθα	tiu ĉi ὅδε

Oni vidos tuj ke mia eltrovo tute ne bezonas pruvadon. Ĝi pruvas sin tuj. Sed estas aliaj rimarkoj, kiuj sekvas necesege. Niaj Ariaj praavoj havis neniun alfabeton. Ne ekzistas sola vorto aŭ litero de la Aria lingvo en la tuta mondo. Se ili havis alfabeton, ili estus lasintaj al ni sendube vortojn skribitajn sur ŝtono, sed tiaj ŝtonoj tute ne ekzistas. Sed malgraŭ tio, la lingvo sin transformis. Necesege estas, ke instruistoj kaj lernejoj kaj lernknaboj ekzistis, kaj tio farus grandajn ŝanĝojn en la lernsistemo. La universala sukceso de ĉiu sistemo estas mirega. Sed kial fariĝis diversaj sistemoj? La Latina sistemo estas ĝuste tiel regula kiel la Greka aŭ la Esperanta. Sed la motivo por ŝanĝo ne aperas.

## Terkultura kalendaro

(Daŭrigo)

### APRILIO

Marto ĵus malaperis, kune kun ventturniĝo de dika griza nuboj, kiam ekvidiĝas Aprilo, karega sunido, kies benataj radioj eniĝas la tordajn branĉojn de la paralizitaj arboj, la tremantajn pintetojn de l'pinoj, la rozkolorajn berarojn de la ekflorantaj erikoj.

Subite, la tuta arbaro vekigigas, kaj ekstremas ĝoje sub la multegaj sunaj polvoj, defalantaj en la dormantan arbaron.

« La printempo ! jen la printempo ! » ili mallaŭte paroletas, rampante sur la plorantaj muskoj, suprenirante la altajn trunkojn, kaj tuj refalante per blindigantaj kaskadoj.

La printempo ! Tiam la branĉetoj reviviĝas, tie ĉi kaj tie plumigataj buletoj sin movetadas, sin puŝetas en saltetoj de freneza plezuro, kaj el gorĝetoj ankoraŭ raŭkigataj de la nebulega vintro pepoj eliras, vere dankemaj kantetoj.

Ĉar ree alkuris en niajn boskojn, en niajn ĝardenojn laflugilaj kantistoj, amataj kaj atendataj de ĉiuj ; ĉar, el sia vintra malliberejo la brilaj milkoloraj papilioj forflugis.

Aprilo malfermas la serion de la belaj monatoj de l'jaro. Ĝi estas efektive la tempo kiam la servema Naturo aperas al ni, kun ĝia unua, sed tiel alloganta ĉarmo ; kiam, kovrante la arbarojn per pli kaj pli malpala verdaĵo, ĝi dolĉe kaj iom post iom malvolvas siajn naskiĝantajn ornamantojn.

Jam unuan foliaron ekmontras ulmo, jam maturiĝis iaj fruktoj, pro la varmgrado superanta je kvin gradoj la antaŭan monaton. Tiam la ĝardenistoj havas multe por laboradi : Ili devas, de la unuaj tagoj de l'monato, tre zorgi pri la *florejo*, renovigi la sablon de la aleoj, formeti la florintajn kreskaĵojn, atenti la moviĝantan floradon de la fruaj rozujoj, kaj ilin per tabakaj fumaĵoj liberigi de la puletoj minacantaj iliajn branĉidojn, klarigi la plantejon de la ĉiujaraj kreskaĵoj loke semitaj en Marto.

Ili zorgos ankaŭ fini ĉiujn semadojn de floroj, ĉu surbedo, ĉu sur terstrio bone elmetita al suno, kaj precipe plenigita je bona planta tero ; elmeti al la lumo, kaj tra dolĉa temperaturo, la bulbetojn de dalioj, por ke ili burĝonu pli rapide.

Sed ni precizigu per kelkaj ekzemploj

Tiam vi povas loke semi lupinon, tropeolon, kampa-nulon ; aŭ idareje semi levkojn, kalendulojn, reĝinajn lekantojn, ĥinajn kaj hindajn diantojn, floksojn ; bede semi balsaminon ; vi povas ankaŭ planti gladiolojn, kaj replanti la kreskaĵetojn semitajn dum la antaŭaj monatoj ; aerumi la varmejojn en kiuj estas heliotropoj, verbenoj, begonioj, pelargonioj ; reenpotigi kaj pinĉi la tranĉitajn kaj replantitajn branĉetojn de krizantemoj, fini la plantadon de la arboj je falontaj folioj.

Ĝi estas la konvena jarsezono por planti rezinajn arbojn en *pejzaĝa ĝardeno*, tondi la herbarojn kaj la novajn semi, provizi la internon de la boskoj per persistaj kreskaĵoj florantaj, kaj ombre kreskontaj. Oni povas per farunaj vermoj malproksimiĝe demetitaj, allogi birdojn insektomanĝantajn, kiuj detruas la raŭpojn. Detrui ĉiujn insektojn, precipe en la frukta ĝardeno, devas esti la plej granda zorgo de ĉiu ĝardenisto.

Iaj anglaj gazetoj, inter kiuj la *Gardening*, rekomendas gudran akvon kiel malplejcostan kaj plej efikan rimedon kontraŭ la insektoj liverantaj siajn ovojn sur la kreskaĵojn, kaj aparte kontraŭ la papilio de la lekanto, kaj de la krizantemo. Se vi almetos iometajn vaporiĝojn ne nur al kreskaĵoj, sed samtempe al iliaj subtenaĵoj, la gudra odoro forigos same la papiliojn de la celerio. Por prepari gudran akvon, boligu dum duona horo duonan funton da terkarba gudro en ok litroj da akvo, ĝis kiam ĝi estos tute kunmiksita kun akvo, kaj la produktaĵon tiel atingitan pligrandigu per 250 litroj da akvo.

La jena rimedo tre bone sukcesos ankaŭ: zorge konservu lignajn cindrojn, en seka loko. Kiam vi tondos persikujojn, almetante al muroj iliajn branĉojn, aŭ kiam vi purigos viajn florbedojn, vi disŝutos tiujn cindrojn de l'supro sur viajn arbojn. La cindroj falos sur ĉiujn branĉojn, kunligante sin kun la kuseneto de ĉiu burĝono, kiun ili tiamaniere ŝirmas kontraŭ la frostoj; plie la restaĵo defalinta malsupren de la muro forigos limakojn aŭ malhelpos puletojn. Tio estas nek malfacila, nek kosta.

Oni semas ĉiudusemajne, en *legoma ĝardeno* pizojn, latukojn, romanajn salatojn, rafanetojn: kaj intertempe somerajn spinacojn (kiuj estas nomitaj tetragonoj), florbrasikojn, brasikojn de Bruxelles, de Milan, kukumetojn, porelojn, bulbojn, skorzonerojn, karotojn, ĉiujn plenterajn legomojn.

Eksemu fazeolojn, sed en ŝirmita loko, kiel la fruan malgrandegulon de Holando, kaj tiun de Laono. Ĝi estas ankaŭ la tempo prizorgi la branĉetojn de la asparagoj, kaj la burĝonojn de la artiŝokoj, kiujn vi sterkos kaj surverŝos.

Plantu la sezonajn terpomojn, ĝustlokigu la fazeolojn semitajn en potojn aŭ sub vitraĵo. Vi transplantos sur bedon kaj sub kloŝon la melonojn semitajn en februaro. Vi semos sur bedon maldikan Italian cikorion, tomatojn, melonojn de dua sezono, kaj fine de l'monato, vi semos kukurbojn en plena tero, vi borderos la terstriojn per fragujoj, okzalo kaj drakunkolo.

En la plej multo de la *fruktaj ĝardenoj*, oni kunigas la kulturon de la arboj, kaj tiun de la legomoj; tiu ĉi kuniĝo estas pli profita ol la tuta disiĝo de la kulturajoj. Duobla kulturo donas al mastraĵo pli da fruktoj kaj samtempe pli da legomoj, per unu vorto pli ŝatindan gajnon. La jenajn sciigojn mi elprenas el grava terkultura ĵurnalo de la Franclanda Centro.

Kiam oni zorgas dediĉi al arboj terstrion samlarĝan kiel ilian kapon por la altaj trunketoj, larĝan je 1 m. 50 aŭ 2 metroj por la trunketoj malaltaj, la du kulturajoj tiel aranĝitaj alportas tre malgrandan damaĝon unu al alia.

Sed okazas ofte ke oni estas devigata, pro la malgranda teraĵo kiun oni disponas, kulturi legomojn eĉ en la terstrioj

difinitaj por la arboj. Tiamaniere la legomoj, ĉar ili estas sub ombraĵo, malpli profitas la maldikajn somerajn pluvojn kaj nutremajn elementojn de l'tero. Necesas do ke oni sciigu tiujn elektojn, kiuj plej bone sukcesos en tia sido, kaj ke oni donu al ili pli da grasigaĵo, kiun postulas la arboj kaj plejmulto da legomoj. Oni devas kompreneble surverŝi ilin pli ofte ol se ili estas unuaj en tero. — Jen la plej bonaj rezultatoj atingitaj:

Sub la arboj sidantaj apud la muroj elmetitaj al varmo: la latukoj, kapaj brasikoj, ajlo kaj blankaj bulboj aŭtune plantitaj, kaj manĝotaj antaŭ la monato Junio; la unuaj semadoj de malgrandegulaj pizoj kaj fruaj terpomoj; la latukoj kaj kapaj brasikoj idareje semitaj en la komenco de Marto; la rafanetoj sammomente semitaj; la frizitaj cikorioj idareje semitaj la unuajn tagojn de Majo.

Sub la arboj plenaere sidantaj: la kapbrasikoj, florbrasikoj, poreloj, leontodoj idareje semitaj de la duono de Marto ĝis la komenco de Junio, kaj difinitaj por esti definitive ĝustplantitaj ok aŭ dek semajnojn post la semado; la spinacoj, rafanetoj, cerefolio, kreso, loĝeje semitaj de Majo ĝis Aŭgusto, kaj ombraĵon postulantaj; la bulboj semitaj dum Aŭgusto aŭ Septembro.

Per unu vorto, la legomoj plej bone sukcesantaj sub arboj estas tiuj, kiuj okupas teraĵon nur de Oktobro ĝis Majo; kaj kiuj ĝin okupas idareje dum du monatoj de la bela sezono kaj kiuj bezonas ombron. Ni aldonu la dikfruktajn fragujojn, okzalon, petroselon, timianon kaj ajlon fistulozan.

De la unua de Aprilo la *brutaroj* ĉesigis eniri naturajn herbejojn, kaj feliĉaj estas la terkulturistoj sin provizintaj per sufiĉe da betoj, karotoj, terpomoj, napoj, kiujn ili bezonas por siaj bestoj ĝis la unua dekkvino de Majo. Ili devos uzi tiam ĉiutage 5 kilogr. da radikoj por 100 kilogr. da vivanta bruto.

Oni povas konduki tamen la *ŝafojn* en la malnovajn luzernejojn, kaj en la kampojn de verde manĝotaj grenaĵoj. Metu la *porkojn* en paŝtejojn; aerumu kaj purigu la stalojn.

Pri la *jungbestoj* daŭrigu, kiel en la Marta monato, la saman porcion, al kiu tamen vi aldonos branon post la matena jungo, se ili plilaboradis. Vi devas kompreneble ĉiam pligrandigi la porciojn laŭ la pligranda laborado de la bestoj; kaj laŭtempe la verdajn nutraĵojn alterni per la sekaj furaĝoj.

Ĉar la draŝoj estas preskaŭ ĉie finitaj, vi nature difinos la kribraĵojn por la nutraĵo al la junaj kortbirdoj; vi nutros novajn *kokidetojn* per pastaĵoj kaj milio; vi donos branon kaj hakitajn herbaĵojn al anasidoj kaj anseridoj, kaj vi tre zorge observos la kovantajn maleagrinojn, kiuj tre povus morti pro malsato sur iliaj korboj. La *abeloj* jam ektrovas sian vivon en la kamparo.

Ni ne povas pli detale raporti tie ĉi pri la kortbirdoj. Sed, ĉar ĝi estas tre grava afero de kampa domo, kaj tial ke la kokinoj estas tre kovemaj en Aprilo, ne senutilos eble la jenaj sciigoj. •

Ĉiu raso kunhavas bonajn kaj malbonajn ecojn, kaj malfacile estas montri kiu vidiĝas la plej bona el ĉiuj; tio dependas efektive de multaj vidpunktoj.

Se oni deziras puran rason, la kokinoj devas esti ĝuste kunmetitaj kun la koko; sed, se vi intencas diversigi aŭ plibonigi specon, vi bezonas krucigi la rasojn. •

Serĉu mezan dikecon, dikan kapon, dikan kolon, dube bluajn piedetojn, kaj kreston ruĝan, pendantan kaj glatan. Oni jesas ke la nigraj kokinoj liveras pli multe da ovojn ol la diverskoloraj kaj ili pli facile sin elprenas el la bonega kaj kruela vido de la rabobirdoj, kiuj flugas alte kaj oftege super la kortbirdoj. Tro grasa kokino senkonkajn ovojn demetas. Se ia kokino rompas kaj manĝas siajn ovojn, vi devos ĝin apartigi, grasigi kaj fine mortigi.

La plej bona koko estas tiu, kiu fajron elmontras en la okuloj, fierecon en la stato, liberecon en la movoj, kaj ĉiujn proporciojn antaŭsignantajn la forton: mezan kreskon, dikan kaj mallongan bekon, rektan kaj bele rozkoloran kreston, larĝan bruston, fortajnflugilojn, muskolajn femurojn, dikajn krurojn, armitajn per longaj spronoj, kaj piedetojn provizitajn per ungoj iomete hakaj kaj akraj. La vosto devas esti longa kaj kurbigita kiel rikoltilo, la plumoj de l'kolo longaj, lumantaj kaj refalantaj ĝis malsupre de la femuroj. Lia bela fortikeco daŭras tri aŭ kvar jarojn.

Vi tre bone faros pretigante senkulturejojn en la *kampano*, kaj plugante la terojn por elradikigi la grenpajlojn, hundherbon, agrostison, k. t. p.; erpante hordeojn kaj avenojn semitajn en Marto, pikfosante denove grenojn kaj aŭtunajn fabojn, sarkante karotojn, papavojn, plantejojn de betoj, k. t. p.

Oni ja semas la printempajn hordeojn, betojn, brasikojn, maizon, luzernon, ĉu en tritiko, ĉu en marta grenajo, ruĝan trifolion (10 aŭ 12 kilogr. por hektaro), onobrikon, kiu estas la plej konvena kreskaĵo de la ŝtonhavaj kaj precipe kalkŝtonaj teroj, kanabon, linon, lupulinon, k. t. p.

Oni plantas la terpomojn el kiuj necesas uzi proksimume 25 hektolitrojn por unu hektaro, sed oni tre zorgis elekti, por ilin planti, terpomojn dikajn kiel kokina ovo, seke verdiĝintajn de la rikolto; oni plantas ankaŭ la lupulojn en terojn bone plugitajn kaj sterkitajn, oni ektranĉas kaj sterkas la fonditajn lupolejojn; la rozkoloran trifolion oni falĉas.

La sekalo, antaŭe semita kiel furaĝo, estos rikoltata tuj kiam ĝi spikos, kaj la Kolza-napo tuj kiam ĝi ekfloros.

Zorgu fine detruigi la kreskaĵojn malutilajn al herbejoj, kaj la talpejojn, pasigi la rulon sur la herbejoj, almeti la

fastajn grasigaĵojn; kaj se la vetero estas dolĉa, surverŝu denove kaj sufiĉege, sed ne daŭrigante tiel longe kiel en aŭtuno.

De la 15-a de Aprilo ĝis la 20-a de Majo, ŝirmu la vinberujojn kontraŭ la printempaj frostoj, ilin fumigante; ŝirmu ankaŭ per dornoj la arbojn plantitajn sur la rando de la vojoj, ĉar ili povus esti atingitaj de la brutaro kaj sensukiĝi pro tio. Ĝi estas cetere la momento tondi ilian kapon kaj senigi ilin je la troaj branĉoj.

Ne forgesu valorigi la arbetarojn de la kverkoj, kies ŝelo estas difinita por tano.

PAUL CHAMPION.

---

## Hispanaj proverboj

Silenta malspritulo, estos estimata kvazaŭ scienculo.  
 Estu bonfaranto, nepripensante, kia estas la ricevanto.  
 Kiu multe ĉirkaŭpremas, malmulte premas.  
 Kiom la pokalo grandiĝas, tiom la korpo maldikiĝas.  
 Ne ekzistas bona fermilo, por ora ŝlosilo.  
 Kiam kruĉo frapas sur ŝtonon, por la kruĉo la malbono,  
 kiam sur kruĉon frapas ŝtono, por la kruĉo la malbono.  
 Pordoj fermitaj ne estas, por blankharoj honestaj.  
 Kiu malproksime edziĝas, aŭ trompas aŭ trompiĝas.  
 Plimulte kuracas la dieto, ol la lanceto.  
 Preferinde edziĝi, ol bruliĝi.  
 Ju pli granda la supreniro, des pli granda la falo.  
 Malmulto terurigas, kaj multo kvietigas.  
 Antaŭ la horo bravega, kaj ĉe la horo, timega.  
 Patro ŝparema, filo disdonema.  
 Mono forgesita, nek dankita, nek pagita.  
 Akvo neniam malsanigas, nek malriĉigas, nek ebrigiigas.  
 Post agema akiranto, diligenta disdonanto.

*Esperantigis* R. CORDONIŬ.

(Murcia).

---

# TRA LA MONDO ESPERANTISTA

## Esperanta versfarado.

La demando ĉu Esperanto devas imiti kaj reprodukti la fremdajn versfaradojn aŭ alfari al si propran versarton, rilatas al nedisputebla lingvistika principo, t. e. en ĉia lingvo, la formo de versfarado, same kiel la formo de proza stilo, harmonias kun la naturo mem de la lingvo.

Sed Esperanto ne estas, kiel greko kaj latino klasikaj, lingvo prozodia, kies vokaloj, longaj aŭ mallongaj, formis sistemojn da metraj piedoj, sendepende de la akcento tona.

Kontraŭe, Esperanto similas al plimultaj lingvoj hindeŭropaj, el kiuj ĝi estas elfarita, en kiuj akcento tona, naturon ŝanĝinte, el *melodia fariĝis ritma*, kaj, anstataŭ « signo de alta muzika noto » (1), fariĝis silabo forta, kaj, venkinte la kvanton prozodian, ĝi ritmigis la verson ; tiel, la akcento tona, kiu antaŭe jam ne estis parto de la klasika metriko, havis de nun en la malfrua latina versfarado ĉefan rolon. (2).

La versarto de la *romanaj* lingvoj estas nur speco de tiu ritma procedo. Kiel Komodiano kaj Paŭlino faris, tiel Dante kaj Chrétien de Troyes sekvis la latinajn ritmojn, ilin tamen konformigante al la karaktero de siaj lingvoj, (3) kaj efekti-

<sup>1)</sup> Ĝi faris « impreson de supera kvarto aŭ kvinto super la recitativa kordo ». RIEMANN-DUFOUR : *Traité de Rythmique et de Métrique grecques*, Paris 1893, p. 16.

<sup>2)</sup> Versoj *ritmaj* paŝis de Komodiano (III-a jarc.), per Paŭlino de Akvilejo (VIII-a jarc.), al la himnistoj de la meza epoko. Oni tamen rimarkos, ke la unuaj versoj en Romo, antaŭ la klasikaj tempoj, estis *ritmaj*. E. MISSET : *Le Vers Saturnien*, 1888.

<sup>3)</sup> Jen ekzemple versoj romanaj devenintaj el la klasika epopea metro mem, prezentante, sur la deviga interpaŭzo kaj sur la finiĝo, akcenton sur fiksa loko, krom la flankaj akcentoj.

1. dufoje ina (5/7 : 12) :

De nos otages // ferat trencher les testes.

*Turnu)*

(Chanson de Roland.)

vigante versojn, pri kiuj oni povas diri, ke ili estas aliformigo de Eneido, kiom tiaj lingvoj estas devenaĵoj de la latina.

Sed plie, la verso de kantoj de la meza epoko, ŝajnas, servi kiel modelo al la angla deksilaba verso nomata *heroic verse*, kiun Shakespeare uzis. Ni ĝin ree trovas en la Schiller'aj dramoj, ktp. Tiel, unu sama versfara tipo, uzita en Grekujo, alprenita de la Romanoj, poste aliformigita en Italujo, Francujo, Anglujo, Germanujo, ludas precipan rolon en la ĉefaj Eŭropaj literaturoj (4).

La sama procedo ekzistis en Azio, antaŭ la disvolviĝo de la greka arto; tia estas la formo de la plej malnovaj poemoj hebreaĵ kaj kaldeaj; ĝi troviĝas ĉe la malnovaj Peruanoj (5), sed ĝi precipe regas la sistemon de la bizantina himnofarado kaj ankaŭ de la novgrekaj poetoj.

Ĝi estas efektive la versfarado plej konvena al la popolaj postuloj, sekve plej internacia. Kontraŭe, la klasika prozodio, malfrua sekvo de ia prasilabismo almetita al vokalriĉaj lingvoj, havis nur malvastan uzadon; eĉ la enkondukon de la prozodiaj versoj oni povas historie demontri.

Nur lingvo franca latinan akcenton tiel ŝanĝis, ĝin metinte devige sur la lastan silabon, ke la verso estas nur difinita nombro da silaboj, bezonanta rimon, por en certa maniero rimedi la senigon de flankaj akcentoj regulaj.

Tion Esperanto ne povas reprodukti, tial ke ĝia strukturo

2. ina, vira (5/6 : 11) :  
De ces paroles // que nos avez ci dit. (Id.)
3. vira, ina (4/7 : 11) :  
Que nos perduns // clere Espagne la bele. (Id.)
4. dufoje vira (4/6 : 10)  
En cest pais // avez estet set ans. (Id.)
- 3 : E guarda ben // la mal toltta moneta. (DANTE, Inf. 19.)
- 3<sup>bis</sup> : Ch' esser ti fece // contro Carl(o) ardita. (Id.)
- 3<sup>bis</sup> : A quién dejaste // sucesor muriendo. (Moratin.)
- 3 Un tempo fué // qu(e)en cítara sonora. (Id.)

4) Vidu THURNEYSSEN : *Z. für romanische Philologie*, XI, 305—326. — Al. BELJAME : Antaŭparolo al la eldono de *Enoch Arden* de Tennyson.

5) PACHECO ZEGARRA *Ollantai*. Paris, 1878, p. CXI.



malhelpas, ke oni elparolu nombron da silaboj, ne elmetante akcentan ritmon, kiu ne apartenas al la franca lingvo (6).

Aliparte, ĉar Esperanto ne havas prozodian kvanton, ĝi ne elfaros verajn metrajn klasikajn versojn ; ĝi nur povas ilin imiti feliĉe, kiel la germana lingvo, t. e. anstataŭigante la longajn kaj mallongajn vokalojn (— —, — — —) per fortaj kaj malfortaj, aŭ akcentaj kaj neakcentaj (· ·, · · ·) por elfari tonajn aŭ ritmajn versojn.

Restas al Esperanto tia verso ritmita laŭ akcento, per kio ĝi reproduktas, konforme al ĝia propra strukturo, la versfaradon de samstrukturaj lingvoj ; kaj, se ĝi alfaros al si specialan versfaradon, tiu devige alkonformiĝos al la versfarado de samakcentaj kaj samformaj lingvoj.

Ĝi do pli-malpli respondos al la diversaj eŭropaj versartoj, novlatina, novgreka, germana, slava, ktp. ; sed ĉar ĝi estas pli mire fleksebla kaj akcentoriĉa, al ĝi ne sufiĉos havi unu ĉefan silabon sur fiksa loko kaj forigi aŭ laŭvole dismeti la flankajn akcentojn ; ĝi povas unujn kiel aliajn same precize reguligi kaj eldoni versfaradon tiel regulan, harmonian, fortan, densan, kiel ekzemple la germana, tiel povan kaj diversigitan, kian la grekaj himnistoj sukcesis fari, kaj tute kapablan internaciigi, ne seniginte je sia propra formo, la diversnaciajn poetojn.

Ne estas loko por plene disvolvi tiun akcentan rolon, sed tio sufiĉos por pruvi, ke la Esperanta versfarado, laŭ la procedo klare elĉerpita nur el nedisputebla ekzemplaro de plej gravaj ĝisnunaj verkistoj, estas arto vera, sendependa, memstaranta, ĉar ĝi estas fondita sur la konstrueco mem de la lingvo ; ŝajnas do senbezono, ke por ĝin pravigi, ni reiru al la novlatina aŭ al la germana versaro.

J. PARISOT 8113.

---

<sup>6)</sup> Cetere versfara regularo franca, ekzemple pri la renkonto de vokaloj, ne konvenas al Esperanto. Ne zorgante pri la akcentiĝo en Esperantaj versoj, oni elfaras . . . prozajn liniojn dekdu silabajn. Fine, konforme al la rimarkoj de D-ro Zamenhof, dum la Boulogne'a Kongreso, pri akcento, mi aldonos, ke la *akutaj* finiĝoj francaj (*bâtisse, amasse, louis . . .*), spite de la simileco litera, tute ne respondas al la vortoj esperantaj *batis, amas, lui*, kiuj estas paroksitonaj kaj apartenas al *inaj* rimoj.

---

## S. SILBERNIK

La 25 de marto alportis al la familio de D-ro L. L. Zamenhof tre doloran perdon : post kelkaj semajnoj da suferado mortis en Varsovio, en la loĝejo de unu el siaj filinoj, la patro de S-ino Zamenhof, S-ro S. Silbernik.

La morto de S-ro Silbernik estis dolora bato ne sole por S-ino Zamenhof, sed ankaŭ por ŝia edzo, kiu ĉiam sentis por la mortinto la plej profundan kaj sinceran amon kaj estimon, plene merititan. Ankaŭ ni ĉiuj perdis en li *samideanon*, pri kiu preskaŭ neniun ion sciis kaj kiu tamen ludis tre gravan rolon en la historio de Esperanto.

Kiam la aŭtoro de Esperanto decidis elpaŝi publike kun sia afero, li havis antaŭ si tre malfacilan taskon. Neniu volis ion aŭdi pri Esperanto, neniu volis riski eĉ malgrandan sumeton da mono, por eldoni la unuajn malgrandajn broŝurojn pri Esperanto. Tio ĉi estis farita per la helpo de S-ro Silbernik. La komenca, treege malfacila propagandado postulis tre multe da mono, kaj la aŭtoro de Esperanto ne sole ne havis tiun monon, sed... li ne havis eĉ de kio vivi kaj nutri sian familion, ĉar en la daŭro de tre longa tempo liaj profesiaj enspezoj estis tiel malgrandaj, ke ili ne povis kovri eĉ parton de la plej necesaj kaj plej modestaj elspezoj. En la daŭro de 15 jaroj li devis batali pro sia pano, ĝis li fine, antaŭ 2-3 jaroj atingis tion, ke liaj enspezoj jam kovras liajn elspezojn. Se la aŭtoro de Esperanto ne tute dispremiĝis de la grandaj elspezoj de la komenca propagando kaj se en la daŭro de la 15-jara serĉado de pano li havis la eblon ne ĉesi labori por Esperanto, dediĉante al tiu ĉi laborado sian tutan liberan tempon kaj sian tutan kapon, — li ŝuldas tion ĉi al sia mortinta bopatro, kiu kredis je la ideo de sia bofilo kaj en la daŭro de la tuta panoserĉa tempo lin subtenadis. Li subtenadis lin ne sole materiale, sed ankaŭ morale : tuj post la apero de Esperanto li ellernis ĝin perfekte, malgraŭ sia maljuna aĝo ; li konsoladis ĉiam sian bofilon, kiam la esperoj de tiu ĉi lasta komencis malfortiĝadi ; li havis ĉiam grandan amon kaj intereson por la afero Espe-

ranta, kaj la lastaj libroj kaj gazetoj, kiuj troviĝis sur la skribtablo antaŭ lia morto, estis Esperantaj.

Oferadi *speciale por Esperanto* li ne povis, ĉar kvankam li estis bonhava, li tamen ne estis riĉa (li havis en la urbo Kovno, en kompanio kun alia persono, malgrandan fabrikon de saĝo, en kiu li persone laboris ĝis la 74-a jaro de sia vivo); krom tio li havis ne malpli ol naŭ filojn kaj filinojn. Sed kiam ni ekmemoros, ke nur dank' al lia dekkvinjara subtenado la aŭtoro de Esperanto povis tiel longe elteni en la plej malfacilaj cirkonstancoj kaj neniam ĵeti sian laboradon — tiam ni komprenos, kiom multe la afero Esperanta ŝuldas al tiu senbrua amiko de nia afero, al tiu tro malmulte konata, sed meritega Esperantisto, kiu ĵus nin forlasis. Eterna ama memoro restu por lia nomo !

---

## MOVADO ESPERANTISTA

---

### Franca

**Parizo.** -- La ĉiutaga gazetaro, kiu jam en la momento de la Boulogne'a Kongreso ĉesigis nedaŭre sian indiferecon kontraŭ nia afero, ree komencas paroli pri Esperanto. En la gazeto *Le Gaulois* (17 marto) aperis favora noto rekomendanta la agadon de leŭtenanto Bayol, kiu propagandas nian lingvon ĉefe ĉe la oficiroj kaj soldatoj kaj ĉe la anoj de la Ruĝa Kruco. La sama samideano prosperis konvinki la gravajn ĵurnalojn *Petit Journal*, *Le Journal* kaj *Patria*, kiuj regule informos la legantojn pri la progresoj de nia lingvo. Por la lasta gazeto li deziras ricevi portretojn de kiel eble plej multaj Esperantistaj oficiroj en la mondo: ni petas niajn legantojn, ke ili sendu tiajn portretojn al nia Redakcio por ke ni transdonu ilin al la dezirantoj. — En *Le Petit Parisien* ankaŭ aperis bona artikolo por Esperanto kaj avizo de la redakcio sciiganta, ke ĝi enpresos regule la sciigojn pri Esperanto. — La Grupo Pariza havis sian jaran kunvenon. Oni reelektis la komitaton kaj diskutis proponon de S-ro Cart, ke la grupo eldiru sian alligatecon al la Franca Societo p. p. E. Tiu propono estis akceptata je granda plejmulto de la voĉoj. Post tio oni admonis la ĉeestantojn ke ili varbu novajn membrojn por la grupo, kies anaro restas

ĉirkaŭe sammulta jam de tri jaroj. — Unu el niaj kompostistoj en la P. E. S., S-ro Luis Carlos, italo, prospere subtenis la ekzamenon por la Atesto pri Kapableco. — Franca parlamentano, S-ro Lucien Cornét, deputato de l'Yonne, sendis al la registaro proponon de leĝo subskribitan de aliaj parlamentanoj Paul Meunier, Bouchey-Allay, J. L. Breton, Camuzet, Roblin, Bouveri, Thivrier, A. Boyer, Bénézéch, Chauvière, Delory, ordonanta, ke Esperanto estu enkondukata en ĉiujn instruajn programojn, kie vivantaj lingvoj fremdaj estas instruataj. Laŭ ĝi la lernado de Esperanto estus laŭvola kaj la lernantoj povus elekti inter la angla, germana, itala, k. a. lingvoj. (*Le Matin*).

## Belga

**Kursoj** estas komencitaj en Courtrai, Spa, Duffel. — S-ro Coox paroladis en Lierre; li esperas, ke li povos organizi kurson.

**Gazetaro.** — Kiel ni jam diris en antaŭa numero, la grava gazeto *Le XX<sup>e</sup> Siècle* enpresos ĉiudimanĉe artikolon en Esperanto. Sin turni al S-ro L. Blanjean, 83, rue du Collège, Ixelles. — La instruistaj gazetoj *Journal des Instituteurs*, *L'Instituteur Belge*, *De Nationale School*, enpresas regule artikolojn pri Esperanto; la due citita enpresos tutan kurson. — La Internacia Oficejo de Instruistaj Federacioj eldonis sian regularon kvarlingve angle, flandre, france kaj Esperante. — Bonaj artikoloj aŭ notoj aperis en *La Métropole*, *La Flandre libérale*, *Le Peuple*, *Le Travail*, *La Chronique*, *L'Ami de l'Ordre*.

(Laŭ *Belga Sonorilo*).

## Germana

Grupoj fondiĝis en Mannheim (S-ro Siebert, Rhein-dammstr. 23), en Leipzig (S-ro Fritz Stephan, restoracio, Tauchnitzbrücke) kaj en Frankfurt a. M. (teknika sekcio de la jam ekzistanta grupo). Paroladoj estas faritaj de D-ro Blachstein en Leipzig ĉe Deutschnationaler Handlungsgehilfen-Verband; de S-ro Hauptvogel, blinda lingvinstruisto en Leipzig; de P-ro Staudinger en Frankfurt ĉe la framasona loĝio « Einigkeit »; de Rektoro Heine en Essen ĉe steno-grafia Societo; de S-ro Fritze en Halle ĉe Techniker-Verein; de S-roj Christoffel kaj Schuck en Braunschweig ĉe Steno-grafia Societo.

**Kursoj** estas komencitaj en Leipzig (D-ro Blachstein), Frankfurt (4 kursoj kun 70 lernantoj), Berlin (S-roj Borel kaj Bruhl), Stuttgart (ĉe la komercista unuigo), Braunschweig (25 lernantoj).

**Gazetaro.** — Bonaj notoj en *Wiesbadener Tageblatt*, *Weltwarte* (Leipzig), *Neues Tageblatt* (Stuttgart); *Der Mensch* (Berlín) enpresis germanan tradukon de « Legendoj el Antikva Egiptujo » de Kabe, ĉerpe el L. I.

(Laŭ *Germana Esperantisto*.)

## Hungara

**Gazetaro.** — En la 8-a numero de fama kaj vaste konata ĉiusemajne ilustrita revuo *Uj Idők* (Novaj Tempoj) aperis artikolo de S-ro Z. Baranyai sub titolo « Hungaraj poetoj Esperante ». Tie li parolas pri Esperanto ĝenerale, pri ĝia boneco kaj multflankeco, plie li komunikas ok liniojn el la traduko de poemo de A. Petőfi « Fino de Septembro » (el *Esperanto* hungara), kaj la tutan poemon de E. Farkas « Historieto » (el L. I.). — En la 10-a numero de l'sama revuo en la « Poŝto de l'Redakcio » aperis bona noto pri la hungarlingvaj esperantaj gramatikoj, pri gazetoj esperantistaj k. t. p. — En la 6-7-a numero de stenografista revuo *Szegedi Gyorsíró* (Szegeda Stenografisto) aperis bonega artikolo de S-ro K. Tavaszi pri Esperanto ĝenerale, kaj pri la interrilatiĝo de Stenografio kaj Esperantismo konigante la decidaĵojn de la Szegeda ŝtatgimnazia stenografia rondo. En sama numero plie aperis anonco pri la apero de paroladoj de Bulonja Kongreso laŭ la Schneebergeraj notoj. Nova hungara libro pri la internacia lingvo kaj pri Esperanto estas en presado de S-ro A. Altenburger. Post la apero de tiu ĉi grava scienca kaj propaganda libro ni parolos detale.

**Stenografistaro.** — La komitato de la Szegeda Stenografia Societo en sia kunveno decidis ke ĝi apartan komitaton elektos, kies devo estos ellabori la alfaron de la Gabelsbergera stenografia sistemo al Esperanto. Z. B.

## Bohema

**Praha-Smíchov.** — En tiu ĉi urbo estis ĝis nun farata propagando de nia afero en privataj rondetoj, kaŝe kaj senbrue. Nur tiun ĉi jaron komencas publika propagando per efektivigo de publika kurso esperanta en ĉambro de unu el popolaj lernejoj en Smíchov. La kurso aranĝata de societo « Akademikové Smíchovští » (Adademianoj de Smíchov) kaj direktata de S-ro Bouška estis malfermita la 16-a de jan. per kelkaj klarigoj pri nia lingvo kaj movado, akompanataj per montro de esperantaj gazetoj, libroj, k. t. p., pruntitaj parte de l'parolinto parte de l'rondeto « Verda Stelo ». Specialajn paroladon kaj kursojn faris la sama samideano por studentoj, kiuj grupiĝis en « Studenta rondeto esperantista en Praha-Smíchov ». Post parolado « Dissolvo de problemo pri lingvo internacia » (21 novembro 1905) akompanata per mal-

granda ekspozicieto estas farita elementara kurso kaj post ĝia baldaŭa finiĝo (24 januaro 1906) estas komencita supera kurso (31 januaro). Krom tio la rondeto « Verda Stelo », bone konata al kelkaj grupoj fremdlandaj, faras por vizitintoj de l'pasintjaraj kursoj konversaciajn lecionojn. Vere ĝojiga komenco !

**Obchodni Listy** (Komercaj folioj) gazeto eliranta dufoje ĉiumonate, alportas 6-7 kolumnojn esperantajn en ĉiu numero kaj enpresas plenan kurson de Esperanto, speciale verkitan por komercistoj. Adreso de la redakcio de tiu parto estas : Esp. Klubo en Praha (Por rubriko esp. en *Olch. Listy*), Praha II.

**Brno.** — Kiel konate ekzistis en moravia ĉefurbo ĝis la lasta jaro « Unua Societo de aŭstria Esperantistoj », fondita en jaro 1901. Tiu ĉi unua esperantista grupo en aŭstria monarkejo estis utrakvista, boheme-germana, celanta propagandi nian lingvon inter Bohemoj kaj Germanoj. Lastan jaron la societo decidis specialigi al si la laboron, krei du memstarajn grupojn por ĉiu nacio aparte kaj la societo disiĝis. Bohemaj Esperantistoj baldaŭ grupiĝis oficiale en « Klub českých Esperantistů v Brně », kiu komencas tre bone prosperi. Jam en la fondiga kunveno (22 okt.), malfermita per parolado de S-ro Josef Kajš kaj simpatie salutita per granda nombro da telegramoj — aliĝis 55 anoj. Nova klubo grupiginta en si spertajn malnovajn eĉ fervorajn novajn samideanojn, baldaŭ elvolvis sian entreprenemon. La 24-an de oktobro la klubo komencis sian unuan kurson gvidatan de nelacema « animo de klubo » S-ro Kajš, la 2 nov. ĝi aranĝis la paroladon « D-ro Zamenhof kaj lia verko » de S-ro Kajš ; la 19 novembro faris sama samideano duan paroladon en « Sokol » de Obrany (apud Brno), post kiu fondiĝis kurso direktata de S-ro Zábaj. Grandan bruon en Brno faris la apero de grandaj verdaj afiŝoj notintaj lastajn ĉefajn sukcesojn de nia afero kaj anoncanta al publiko — ses kursojn aranĝatajn de vigla kaj entreprenema klubo en Brno kaj antaŭurboj dum vintra sezono. Ĉu tia agado povas resti sensukcesa ?

H. K. B.

## Aŭstra

Kursoj estas komencitaj en Wien (2-a kurso, S-ro Romanowicz) kaj Brünn (S-ro Steier). Parolado estas farita de P-ro Simon en tiu ĉi lasta urbo. — En Wien estas farita granda publika festo esperantista. — En Reichenberg definitive fondiĝis grupo esperantista, dank' al klopodado de S-ro Rudolf Richter, kiu estas elektita prezidanto. Kurso estas komencita kun 50 partoprenantoj. La grupo intencas fondi eksportan kontoron (adreso : S-ro R. Richter, Reichenberg, Stefanstr. 9). — En Graz S-ro R. Pettera (Vorbeckgasse 12) batalas kontraŭ la lastaj fantomoj volapukistaj. Li petas helpon.

## Sveda

**Grupoj** fondiĝis en Stelleryd (apud Karlshamn), dank' al S-ro J. A. Johansson, popolinstruisto, — kaj en Ronneby dank' al ĵurnalisto Edwin von Schéele. — En Oskarström fondiĝis grupo esperantista laborista, kiu intencas disvastigi Esperanton inter laboristaro de granda fabriko okupanta 1100 laboristojn kiuj parolas 16 lingvojn diversajn!

(*Esperantisten*)

■ **Helsingborgs Dagblad** (25 marto 1906) enhavis la jenan noton : « Telegramo el Londono sciigis nin jam antaŭ kelkaj tagoj, ke la komerca ĉambro de Londono enkondukis Esperanton en la programon de la ekzamenoj, kiel germanan aŭ francan lingvojn. » — Sekvas tre interesanta artikolo de S-ro M. S. v. W., kie la aŭtoro montras tre lerte la meritojn de Esperanto kaj priskribas la progresojn de nia afero en la mondo, precipe en Francujo. Li rememoras pri la grava rolo ludita de Svedujo antaŭe kaj esperas, ke ĝi ree prenos sian lokon en la unuaj vicoj de la Esperantistaro.

## Pola

**Raporto jara de « Varsovia Societo Esperantista » (1905).** — La *Varsovia Societo Esperantista* estis fondita 6-an de decembro 1904 de 12 personoj, al kiuj aliĝis poste 7, ne estintaj en unua konveno. Ili elektis provizore D-ron L. Zamenhof prezidanto kaj S-ron A. Grabowski kiel vicprezidanton kaj sekretarion, kaj komencis regulajn laborojn (\*). Ĉar fondo de novaj societoj estas afero tute nefacila en Polujo, oni decidis krei en komenco filion de la societo « *Espero* » en Peterburgo, kiu havas rajton posedi filiojn en diversaj urboj de rusa imperio kaj same ankaŭ en Polujo. Bonvola konsento de la komitato de « *Espero* » alvenis baldaŭ, sed aprobo de registaro estis donita nur 28-an de februaro 1905. Tiam en unua jam oficiala kunveno, kiu ne povis esti kunvokita pli frue ol 18-a de Majo, oni elektis plenan komitaton laŭ regularo, ĉar nia Majstro pro multaj siaj laboroj ne volis absolute akcepti prezidantecon; kunveno elektis lin prezidanto honora kaj S-rojn: Antoni Grabowski, prezidanto efektiva; Kazimierz Bein, sekretario; Leopold Blumental, vicprezidanto; Adam Zakrzewski, kasisto; Aleksander Brzostowski, bibliotekisto. Agado de la societo dum tiu ĉi jaro devis esti ofte interrompata pro politikaj okazoj, kiuj jam de du jaroj daŭras en nia lando. Tamen la societo krom

(\*) Unua societo, fondita en Varsovio 1-an de decembro 1893 de S-roj Józef Waśniewski, Jan Janowski, Aleksander Blumental, Wilhelm Róbin, Stanisław Goldberg; ne estis tiam permesita kaj devis ĉesi baldaŭ ĉian agadon.

siaj kunvenoj, en kiuj estis priparolataj aferoj ĝeneralaj de Esperantismo, organizis kursojn kaj publikajn paroladojn, en kiuj partoprenis S-roj Grabowski, Blumental, Zakrzewski.

En fino de jaro 1905 la societo havis jam 66 membrojn: 2 honorajn (S-ino Klara Zamenhof kaj S-ro Alfred Michaux, en Boulogne-sur-Mer), kaj 64 efektivajn, inter kiuj 8 virinojn. Sep membroj de la societo partoprenis en Kongreso de Boulogne-sur-Mer, por kies aranĝado la societo oferis 100 fr. Sama sumo estas sendita nun por kostoj de estonta Kongreso en Ĝenevo. Kalkuloj de nia societa kaso estis fermitaj 31-an de decembro 1905 kun superaĵo de 124,26 rubloj (332 fr.)

Ni aldonas tie ĉi registron de laboroj, kiujn kelkaj el niaj membroj enpresis en jaro 1905 pri aŭ en Esperanto en ĵurnaloj polaj aŭ esperantaj, aŭ aparte:

D-ro KAZIMIER BEIN': Pola Antologio (aparte, ĉe Hachette). — Eliza Orzeszko: « La interrompita kanto » (traduko el lingvo pola, Hachette). — Parolado en Kongreso de Boulogne (en « Lingvo Internacia »).

ANTONI GRABOWSKI: « Patro de pestuloj », poemo de Slowacki (en « Lingvo Internacia »). — « Komedio el eraroj », de H. Senkiewicz (en « Esperanto rusa »). — « Mi malĝojas sinjoro », de Slowacki (en « Lingvo Internacia »). — « Fragmento », el A. Mickiewicz (« Ruslanda Esperantisto »). — « Sorĉrondo », el A. Zmichowska (« Ruslanda Esperantisto »). — « La Lasta Rozo de Somero », el Moore (« Angla Esperantisto »). — « Elforeĝo », balado de Göthe (« Germana Esperantisto »). — « Kanto pri vento », (« Angla Esperantisto »).

LÉON BELMONT: Artikoloj en ĵurnaloj « Kurjer Codzienny », « Ogniwo ».

ALEKSANDER BOLESŁAW BRZOSTOWSKI: Artikoloj pri Esperanto en ĵurnaloj polaj: « Naokolo ŝwiata », n-roj 2, 3, 4; « Gazeta Polska », n-roj 3, 58, 76, 84; « Kurjer Codzienny », n-roj 42, 123, 128, 139, 146, 152, 161, 170, 176, 184, 210, 211, 218, 220. « Slowo », n-roj 241, 242. « Gonic » , n-ro 420. « Handlowiec Polski », n-roj 1, 2, 3, 4 k. c.

ADAM ZAKRZEWSKI: artikoloj pri Esperanto en ĵurnaloj: « Kurjer Warszawski », n-ro 233. « Kurjer Polski », n-ro 212. « Gazeta Warszawska », n-ro 185. — Historio de lingvo Esperanta kaj Plena pola gramatiko esperanta en revuo « Ognisko », 1904, 10, 11, 1905, 3, 4. — Ĉapitro pri Esperanto en nia libro: « Język Międzynarodowy: Historja, Krytyka, Wnioski » (paĝoj 44-88).

A. ZAKRZEWSKI.



## Gazetaro Esperantista

---

**Esperanto franca**, 11 februaro. — L. DE BEAUFONT rebatas la argumentojn de S-ro Bourlet kontraŭ la franca S. p. p. E. (vidu antaŭajn n-rojn de L. I.). — H. B. diras, ke Esperanto malaperigos la lernadon de naciaj lingvoj. Tiu opinio estas iom kontraŭtempe publikigita, ĉar ĝuste nun en Francujo la registaro demandas la profesorojn de fremdaj lingvoj, ĉu estus bone enkonduki Esperanton en la lernejojn. — CH. BOURLET diras, ke li ne estas membro de la *Centra Oficejo Pariza*; sekve oni ne povas aljuĝi al tiu ĉi lian propran opinion. Li proponas kongreson de francaj esperantistoj por decidi, kial organizi la yenkon. — Ekzercoj. — *Esperanta fako*. — Pri Esperantismo en Anglujo, revido pri kelkaj el la lastaj progresoj de nia afero en tiu lando. — S-ro MUFFANG montras, ke la logikeco kaj simpleco de Esperanto faros ĝin bonegan edukilon pedagogian. — Diversaj komunikaĵoj.

**L'Espérantiste**, februaro. — L. DE BEAUFONT komencas artikolon pri la franca S. p. p. E., ĝiaj grupoj kaj ĝia utileco por la propagando. — Kroniko, Bibliografio, novaj aliĝoj, komunikaĵoj. — Rakonto, « La unutaga princo », tradukita de D-ro RODET. — J. FLORENS tradukis « La Revo », dialogon de M. Provins. — Versaĵo de J. PARISOT « La Ponto ». — Amuziĵoj.

**Espero katolika**, marto 1906. — La gazeto komencas kun tiu ĉi numero sian 32-paĝan eliradon. E. PELTIER diras, ke *Espero katolika* estas tribuno tute libera, en kiu la ne-katolikoj havas la rajton paroli egale kiel la katolikoj. — Religia movado en la mondo. — A. DOMBROWSKI parolas pri la naturo de la transsubstanciĝo; nova proĵo por klarigi la Eŭkaristian misteron; la aŭtoro apogas sin sur nunaj hemiaj scioj pri atomoj, k. t. p. — Epizodo de la religia milito en Francujo. — Por unuigo de Kristanaro: diversaj opinioj pri tio. — Versaĵo de A. DOMBROWSKI. — Unu libro monate: analizo de « Eklezio mortas, Eklezio mortis! » de BARBIER. Revuo de la Revuoj Esperantaj. — Notoj, bibliografio, k. t. p.

**Internacia Sciencia Revuo**, decembro 1905. — E. TOUCHET parolas pri la atmosferoj de Neptuno kaj Uranuso. — ROLLET DE L'ISLE klarigas la metodon, kiun li kaj liaj kunlaborantoj uzis por verki maristan terminaron en esperanto. Li diras: « Teknika terminaro utilas nur al personoj jam parolantaj Esperanton. Sekve oni povas redakti ĝin nur esperante... Estas nek logike nek eble traduki aparte ĉiun el la teknikaj vortoj. Estus necese, ke oni ekzameni ilin grupe... ankaŭ estas tre grave ekzameni kiamaniere ili aperas en teknika teksto. » La ĉapitroj de la verko estas jene titolitaj: Navigacio; ŝipoj

(konstruado, manovroj) ; ŝipoj marveturantaj ; armilaro ; havenoj ; ŝipistaro ; administracio ; maristaj komercaĵoj. — N. KABANOV tradukis fragmentojn el « Mirindaĵoj de l'Vivo » de Häckel. — IĈET-VERIKOV tradukis artikolon de S-ro Veinberg pri « Grandeco de l'molekuloj ». — Daŭrigo de « Spiritismo antaŭ Scienco ». — En la rubriko « Analizoj, notoj kaj informoj » ni trovas artikolon pri : Karbonoksido kaj tabaka fumo ; Movadoj de la *mimosa pudica* ; Heredeco de intelektaj ecoj kunlige kun fizikaj ; Studado de la fotografaj objektivoj ; Brasika promikroba malsano ; Stato de l'materio en proksimaĵo de l'kritika punkto ; Nova metodo de la profitkalkulado en la agronomiaj entreprenoj ; La okuloj de kankroj en grandaj profundaĵoj ; La hidrogenado de la oksimoj ; Rimedoj por eviti la marmalsanon ; La formulo de la sparteino ; Musa tripanosomo ; La torianito. — En la « Korespondado » estas diversaj rimarkoj pri : Leibniz kaj lingvo internacia ; kunpremi, kompremi, premeĝi, dispromeĝi ; plura : teknika filozofia vortaro ; sufikso *izi* ; k. t. p.

**Internacia Revuo Medicina**, februaro 1906. — « Avizo grava » sciigas, ke la abonkosto por la unua jaro estas malaltigita ĝis 6 frankoj en Francujo, 7 fr. ekster Francujo por faciligi la propagandon al la esperantistoj, sed, diras S-ro FRUICIER je nomo de la eldonantoj, « kompanse je la grava elspezo, kiun ni prenas sur nin por la bono de Esperanto, ni esperas, ke ĉiuj niaj samideanoj, grupoj esperantistaj, k. a. helpos al ni, ĉu abonante mem, ĉu abonigante kuraciston (ĉiu persono konas almenaŭ unu kuraciston, kiu ne povas rifuzi abonon al petanta paciento), ĉu almenaŭ sendante adresojn por propagandaj numeroj, anoncante la Revuon en la lokaj gazetoj, k. t. p. La Revuo, se ĝi estas subtenata de niaj amikoj, povos varbi al nia afero multegajn adeptojn, kiuj estos niaj plej fidelaj samideanoj, ĉar por ili Esperanto estas vere utila ». — Sekvas klinika leciono de S-ro ROMBERG : La kuracado de l'arterio-sklerozo, germane kaj esperante. En la analiza parto, estas raportata france kaj esperante : Pri kelkaj punktoj de la efiko de la salaj laksiloj ; Pri la seksa abstinenco ; La senhareco ; La pilorostomio ; La mana repuŝado de la ŝnuro en la antaŭen faloj ; La parma fromaĝo por nutrado de acetonurinaj diabetuloj ; Regula kuracado de la sifiliso ; Loka kuracado de kronikaj uretritaj ; La lokaj aplikoj de koncentra fenikacido por kuracado de furunkoj kaj de tuberklozaj gomoj ; Joda tinkturo kloroforma. — Angle kaj esperante estas : Revivigo per manipulado de la koro ; Kuracado de la striknina venenado kaj de tetano per spina anestezio ; Mortiga akuta koro ; suturo de grajnetaj vundoj. — Hispane kaj esperante estas : Artefarita spirigado ; Disurio puerpera, veziko puerpera. Fine venas nur esperante redaktita artikolo de P. CORRET pri « La difterio en homaj amasoj » kaj la socialaj problemoj starigataj de ĝi. (*Daŭrigota.*)

# Dua Universala Kongreso en Ĝenevo

sub la prezido de D-ro Zamenhof

(de la 28-a Aŭgusto ĝis la 6-a Septembro 1906)

## Unua cirkulero de la Loka Organiza Komitato.

### PROGRAMO DE L'KONGRESO

- Mardon 28 Aŭgusto, vespere    Oficiala Malferma Ceremonio kaj Koncerto.
- Merkredon 29 Aŭgusto, matene    Preparaj Kunvenoj.  
posttagmeze : 1-a Generala Kunveno.  
vespere    Teatra Vesperfesto.
- Ĵaŭdon 30 Aŭgusto, ŝipveturado sur la Lemana Lago, kun oficiala Festeno en Vevey (Festenkarto : 5 frankoj).
- Vendredon 31 Aŭgusto, matene : 2-a Generala Kunveno ;  
posttagmeze    Akcepto ĉe l'Parko de S-ro Thudicum, en la « Chatelaine ».  
vespere : Balo.
- Sabaton 1 Septembro : posttagmeze. : 3-a Generala Kunveno.  
vespere : Oficiala Ferma ceremonio kaj Koncerto.
- 3, 4, 5 Septembro : Vojaĝo tra Svisujo : Genève, Montreux-Oberland, Spiez, Interlaken, Mürren, Berne, Genève.

\*

*Verda karto* (Fr. 10). — Oni de nun povas aĉeti la oficialan kongreskarton kiu kostas 10 frankojn kaj donas rajton senpage ĉeesti kaj voĉdoni en ĉiuj kunvenoj de la kongreso, partopreni je ĉiuj festoj (ankaŭ je la ŝipveturado sur la lago) ricevi ĉiuj necesajn dokumentojn por la diskutoj kaj laboroj de l'kongreso kaj la adresaron de l'kongresanoj.

*Blanka karto* (Fr. 5.) Ĉiu persono jam posedanta 10 frankan verdan karton havos rajton aĉeti por la anoj de sia familio unu, du, tri, aŭ maksimume kvar blankajn kartojn, kiuj kostas Fr. 5 kaj donas samajn rajtojn kiel la verdaj kartoj, esceptinte la rajton voĉdoni kaj ricevi dokumentojn kaj adresaron.

### *Konkurso pri afiŝoj kaj poŝtkartoj*

Por havi plej arte ilustritan afiŝon, la loka Organiza Komitato, malfermas konkurson inter la esperantistaj artistoj. La formato de la afiŝo estas : 1 m. × 1 m. 30. La konkursantoj devos rezervi lokon por la posta surpriso de teksto : *Dua universala Kongreso de Esperanto ; Programo*, k. t. p. La ilustraĵo povos esti du- aŭ tri-kolora. Ĉiuj, kiuj deziras partopreni en la konkurso, devas sendi sian projekton al la Oficejo de la kongreso antaŭ la 20-a de Majo, skribante sur la dorso de sia projektfolio ian devizon kiun ili reskribos sur fermita koverto entenanta ilian nomon kaj precizan adreson.

## Premio da 50 frankoj

estos donata al la aŭtoro de la akceptota projekto. La desegnaĵo povos utili ankaŭ por kongresa poŝtkarto.

### *Ekspozicio.*

Granda ekspozicio estos organizata. Ĉiuj esperantistaj grupoj estas petataj sendi kiel eble plej multajn dokumentojn alla kongresa oficejo. Specialan cirkuleron petu la interesatoj.

*Aliĝojn, monon, korespondaĵojn, k. t. p., unuvorte ĉion, kio koncernas la Kongreson, oni sendu nur al la Kongresa Oficejo, 15, Quai de l'Île, Genève.*

2-a cirkulero baldaŭ sciigos pri loĝado, vojaĝo, teatraĵoj, balo, k. t. p.

En Genevo, la 2-an de Aprilo 1906.

Je la nomo de la loka organiza komitato

*La ĝenerala sekretario*

*La sekr. komisiita al la gazetaro*

EDMOND PRIVAT.

H. HODLER.

---

## AKCIOJ DE LA P. E. S.

Kelkaj samideanoj, kiuj ne povas finpagi ĉiujn akciojn menditajn de ili, deziras ilin vendi.

Ni petas tiujn legantojn, kiuj volus ilin aĉeti, ke ili turnu sin al la administrantaro de la Societo.

La prezo de unu sola akcio (kun ĉiuj vendaj elspezoj kaj impostoj) estas nun 27 frankoj (anstataŭ 25). Se oni aĉetas kelkajn samtempe, la elspezoj proporcie malgrandiĝas. La pago povas esti farata en kelkaj fojoj. Ni rememorigas, ke laŭ la regularo de la Societo kaj laŭ la francaj leĝoj, kiuj regas ĝin, ĉiu societano havas rajton ekŝigi el la societo kaj postuli repaĝon de siaj akcioj. Tio fariĝas ĝis difinita limo, klarigata en la regularo de la Societo (broŝuro senpaga por akciuloj ; kostas 25 centimojn por ne akciuloj). Informojn oni povas ricevi ankaŭ ĉe S-ro Cotelle, notario en Parizo, 25, Bd Beaumarchais, kiu tenas la dokumentojn.

La regularo de la Societo difinas, ke la akcioj ricevos *el la netaj ĉiujaraj profitoj* 1-e, 4 % el sia nomvaloro (t. e. 1 franko), 2-e, ĉion, kio restos el la profitoj post disdono de parto da ili al rizervaĵo, materialo, laboristoj, administrantoj, k. t. p. de la societo.

Tiu disdono fariĝas post propono de l'administrantaro, kaj decido de ĝenerala kunveno de l'akciuloj, kiu devas fariĝi ĉiujare antaŭ la 30-a de junio.

Ĉiu akciulo havas respondecon en la aferoj de la societo nur por siaj akcioj kaj ne povas esti persekutata post ilia plena finpagiĝo.

PRESA ESPERANTISTA SOCIETO.

---

Presejo de la Presa Esperantista Societo, 33, rue Lacépède, Paris .

Administrantaro : Th. Cart, prezidanto ; Paul Fruictier, Ch. Vérax, deleg.

Sekretario de l'administrantaro : V. Chaussegros.

Teknika direktoro : Lengyel Pál. — Sekretario de la gazeto : William Mann.

## Poŝta kesto.

**M—r Gy—a** (Hdsg). La 13-an de sept. 1905 ni skribis al vi longan, detalan leteron. De tiu tempo ni ne ricevis respondon pri tiu letero, kvankam vi jam du foje skribis al ni de tiam. Ni do konkludas, ke nia letero perdiĝis ; volu nin sciigi, ĉu vi ricevis ĝin aŭ ne ? — Kaj 12/IV      Saluton !

---

---

### ADRESARO DE KOMERCISTOJ akceptantaj uzadon de Esperanto.

AVIZO. — La unua enpreso estas senpaga ; ĉiu nova enpreso kostas 50 centimojn, dekdu presoj = 5 frankojn ; por niaj abonantoj : 12 presoj 2 frankojn.

**Paris**, 33, rue Lacépède, — *Presa Esperantista Societo*, entreprenas la faradon de ĉiuspecaj presaroj.

**Hódság** (Bács-megye), Hungarujo, — S-ro *Molnár Gyula*, deziras interŝanĝi kolektojn da papilioj kun loĝantoj de tropikaj landoj ; interŝanĝas ankaŭ elŝtopitajn (remburitajn) birdojn.

**Valence d'Agen** (France), — *Alfred Gérin*, posedanto de vinberejoj. Bonaj vinoj familiaj naturaj. Prezaro kaj specimenoj afrankite laŭ peto.

**Paris**, IV-e, 17, rue du Temple, — *Fernand Blangarin*, reprezentanto por vinoj. Bonegaj vinoj el Bordeaux, Beaune, Madeira, Malaga, O Porto. — Rumoj. — Peti prezaron kaj specimenojn. — Forta rabato por Esperantistoj.

**Glasgow**, 137, Weet Regent Street, — *Tabaka Sindikato Esperantista*. — Specialaĵo : « CIGAREDO ESPERANTO ». — Telegrafa adreso « Verdastelo, Glasgow ».

**Antverpeno** (Belgujo), 24, Marché-aux-Souliers, — *J. Co-mein*, farmaciisto. Anglaj kaj Amerikaj specialaĵoj.

**Antverpeno** (Belgujo), Vondel strato, — *O. Van Schoor*, farmaciisto.

**Antverpeno** (Belgujo), Transvaal strato, — *J. Ræls-de Rop*. Vinoj pogranda kaj pomezgranda. Agento por Belgujo de « Campanvino Ay ŝaŭmanta Esperanto ».

**Antverpeno** (Belgujo), — *G. Moorrees kaj K-io* « Papeteries Anversoises ». Paperfabriko en Duffel apud Antverpeno. Ĉiutaga fabrikado 60000 kil. Kapitalo : 2500000 fr. Centra oficejo : Pont-aux-Pots, Antverpeno ; Tenejoj : 27, rue des Pierres, Bruselo ; 85, Fléestreet, Londono E.C.

**Antverpeno** (Belgujo), 22, Avenue des Arts, — *D-roj Edm. kaj Raym. Van Melckebeke*. Laborejo por ĥemiaj analizoj.

**Gland** (Vaud) Svisujo, Parc Avicole, — S-ro *Paül Langer*, Komercado da anasidoj, anseridoj, kokidoj Faverolles. Artefaritaj koviloj Mottaž. — Sendado de freŝaj ovojn eksteren.

# Gazetoj Esperantistaj

---

**L'Espérantiste**, oficiala revuo de la Societo franca por la propagando de Esperanto, 24 paĝoj (formato 15 × 20) da teksto franco-Esperanta aŭ nur Esperanta, 8 paĝoj kovrilaj (nomaroj de Esperantaj verkoj kaj de ĉiuj grupoj de la S. f. p. E.) ; *Internacia Korespondado Esperanta* senpage disponebla por la abonantoj — 3 fr. 50. *Jarabono* (1-a de januaro, aprilo, julio, oktobro) *en Francujo* : 3 fr, *ekster Francujo* : 3 fr. 50 ; kun enskribo en la francan Societon 4 fr. ĉie. — Adreso de l' administracio *Louviers* (Eure) France.

---

**Espero Katolika**, revuo monata tute en Esperanto. Rakontoj, artikoloj pri nuntempaj aferoj, ŝakoj, k. c. Jare 2 fr. 50 (en Francando 2 fr.) — Presejo A. BARBOT, 15, rue Etienne Pallu, *Tours* (France).

---

**Espero Pacifista**, monata organo de l'*Internacia Societo Esperantista por la Paco* (krom avizo kontraŭa, la abonintoj estas enskribitaj kiel aliĝantoj al la Societo). — Jara abono (aŭ minimuma kotizo) : 5 frankoj. La Societo akceptas ankaŭ opajn aliĝojn. — Sin turni al S-ro GASTON MOCH, 26, rue de Chartres, *Neuilly-sur-Seine* (France).

---

**Germana Esperantisto**, organo de diversaj germanaj grupoj esperantistaj. Eliras 12 fojojn jare. Redaktata germane kaj esperante. Jara abono 4 frankoj. Administracio kaj Redakcio Esperanto Verlag, MÖLLER & BOREL, *Berlin, S.*, 95, Prinzenstrasse.

---

**The British Esperantist**, oficiala monata organo de la Brita Esperantista Asocio ; 12 paĝoj da novaĵoj k. c. anglo-Esperante, kaj 8 paĝoj da Aldono tute en Esperanto. Jare 4 fr. (sen Aldono, 2 fr.). — Oni abonas ĉe la Sekretario de la B. E. A., 13 Arundel Street, Strand, London.

---

**Tra la Mondo**, tutmonda multilustrata revuo monata, tute en Esperanto. — Nuntempaĵoj, Pri Esperanto, Arto kaj Literaturo, Sciencoj, Komercio kaj Industrio, Militistaro, Maristaro, Teatro, Sportoj, Virina kaj Gejunula paĝo, Felietono, Konkursoj kun valoraj monaj premioj. — Ĉiuj artikoloj estas verkitaj de anoj de l'landoj aludataj. — Jare 8 frankoj ; kvaronjare, 2 fr. 25. — Redakcio : S-ro MONTROSIER, 8bis, rue de l'Ecu d'Or, *Orléans* ; Administracio : 15, Boulevard des deux Gares, *Meudon* (S.-et-O.) France.

---

**La Belga Sonorilo**, organo de la Belga Ligo Esperantista. Eliras 12 fojojn jare. Redaktata france, flandre kaj esperante. Jara abono : 4 frankoj. — Redaktoro-administranto, al kiu oni ĉion sendu : J. COOX, *Duffel*, Belgique

**Internacia Revuo Medicina**, monata organo por praktika medicino, redaktata en Esperanto kaj diversaj lingvoj naciaj, de diverslandaj kuracistoj. Celas ne nur la Esperantan, sed ankaŭ la kuracistan utilon. Jara abono : 12 frankoj. PARIS, 33, rue Lacépède.

---

**Esperanta Ligilo**, ĉiumonata revuo, TH. CART, ĉefredaktoro, 12, rue Soufflot, Paris V. — Abonkosto : 3 fr. jare. Dua jaro (1905), n-ro 5—6 (septembro-novembro).

---

**Esperanto**, scienca kaj literatura ilustrita monata revuo. En la lingvoj Esperanta kaj hungara.

La jaran abonpagon (4 fr.) sendu al la redaktoro MARICH ÁGOSTON, Papnövelde-utcza 6, Budapest, IV, (Hungarujo).

---

**Ruslanda Esperantisto**, ĉiumonata organo de la Societo « Espero » en Esperanto kaj parte en rusa lingvo. — Diversspeca, interesa kaj bonstila literatura materialo : artikoloj pri la problemo de lingvo internacia kaj pri Esperanto ; vasta kroniko de Esperantista movado (propraj korespondantoj) kaj bibliografio ; social-politika fako ; novaj famaj beletristikaĵoj (interalie en 1906 j. estas presata la « Ruĝa Rido » de L. Andrejev), versaĵoj kaj multaj aliaj. — La detalaj prospektoj estas riceveblaj senpage. — Adreso : Ruslando, St.-Peterburgo, B. Podjaĉeskaja, 24, la Societo « Espero ». — La jara abonpago (kune kun membriĝo en la Societon) 3 rubloj (7 fr. 50).

---

**Juna Esperantisto**, ilustrata gazeto por junuloj, instruistoj kaj Esperanto-lernantoj. Eliras monate. Literaturaĵoj, teatraĵoj, karikaturaj. Jara abono 2 fr. 50. Presa Esperantista Societo, 33, rue Lacépède, Paris.

---

## GAZETOJ KUN RUBRIKO ESPERANTA

—o—

**Le Courrier Européen**, internacia ĉiusemajna gazeto, france redaktata. Traktas precipe politikon internacian, ekonomion politikan, pacifismon. — Redaktoro : R. DUMUR. Patronaro : S-ro Bjœnstjerne Bjœrnson, Novicow, Salmeron, Séailles, Seignobos, Sergi. — Jare : Francujo, 12 fr. Alilando : 15 fr. — Oficejo : Paris, 280, boulevard Raspail.

---

**I. C. — Internacia Korespondado unversala**, fondita en 1896 de la Societo de Studoj kaj Korespondado internaciaj. 4300 membroj. 15, rue des Grands-Augustins, Paris. Celo : esti interisto por faciligi ĉion. — 14 sekcioj : I. Mondo kaj Vojaĝoj ; II. Naciaj lingvoj ; III. Literaturo kaj Arto ; IV. Kolektado ; V. Lernantoj ; VI. Sciencoj ; VII. Komercio kaj Industrio ; VIII. Pedagogio ; IX. Juro ; X. Ŝakoj ; XI. Psikaj Sciencoj ; XII. Esperanto ; XIII. Sportoj ; XIV. Feminismo. — Jara kotizaĵo por la tuta mondo 8 frankoj.

---

**Arthur GRAN**, (10994), 138, *Bethune Road, Stamford Hill*, LONDONO, N., deziras informojn kaj korespondon pri la Ciganoj (Nomaduloj) de ĉiu lando kiel en Eŭropo tiel en Azio, kaj pri iliaj lingvo kaj dialektoj, ktp. Dankeme respondos.

---

**Hjalmar Bäckström**, *Saltsjöbaden*, proksime Stockholm, Svedujo, ricevas ĉiuspecajn komercajn komisionojn.

---

## ĈIUJ, NI POVOS PARADIZON IRI.

Kiu bone trinkas,  
Tiu bone dormas.  
Kiu bone dormas,  
Tiu ne pensas malbone.  
Kiu ne pensas malbone,  
Tiu certe ne pekas.  
Nu, ĉar kiu ne pekas  
Paradizon eniros,  
De nun, bone trinku,  
Kaj vi paradizon iros.

Por tio ĉi, oni devas  
aĉeti bonajn vinojn,  
kaj sin turni al

**S-ro CH. JADEAU**  
en **Mercurey** (S.-&-L.)  
France.

## LONDON KOMFORTA HEJMO

por pagantaj gastoj.  
Bano. Bilardo. Forte-  
piano. — Ĝardeno.

En agrabla  
parto de Londono, prok-  
sima je komercaj kaj  
amuzaj centroj. Oni  
parolas Esperante kaj  
angle. Moderaj prezoj.  
Skribu al

**Miss MITCHELL**  
Acuba House,  
65, Marquess Road  
Canonbury  
London, N.

---

S-ro FEDOR POSTNIKOV sciigas siajn amikojn, ke li ne loĝas plu en Vladivostok. Lia nuna adreso estas : S-ro FEDOR POSTNIKOV, Inĝeniero, en *San Francisco*, Unuigitaj Ŝtatoj Amerikaj.

---

## ★ INTERNACIA SIGNO

aprobita de grupoj kaj societoj en Kanad-, Anglo-, Belg-, Franc-, German-, Hispan-, Aŭstro-, Fin-, Itallando, Siberio k. a. rekomen- data de S. F. p. p. E., butontrua, broĉa, kravata, ricevebla ĉe ĉiuj Grupoj Esperantistaj : 1 franko. — Rabato al la grupoj por al- menaŭ 12 : 20 % . — Sin turni al S-ro

**Emile P. GASSE**, 59, Phalsbourg, Le Havre, Franci.

---

**RUDOLFO RAJCZY**, en **Debreczen**, *Csokonay-utca 13*, Hungarlando, volas korespondadi kun ĉiulandaj esperantistoj.

---